

KATALUNA ESPERANTISTO

Llengua internacional i drets lingüístics

NÚMERO 376 (núm. 8 de la 6a època) DESEMBRE/DECEMBRO 2024

MARO ESTAS GUTARO

WWW.ESPERANTO.CAT



**La junulara
Esperanto-movado**

**El moviment
esperantista juvenil**

ENKODUKO

- Redaktora saluto 3

LA JUNULARA ESPERANTO-MOVADO EL MOVIMENT ESPERANTISTA JUVENIL

- L'Esperanto: una gran ajuda per a l'Erasmus
i la mobilitat universitària 4
- De kie kaj kien? Epokoj de la junulara movado de Esperanto ... 8
- Història del moviment juvenil esperantista
als Països Catalans12
- En Filipinoj, Esperanton regas la junuloj 14
- David Ruíz: “Mia amo al historio kaj al idealismaj valoroj
de Esperanto vere ligis min al la movado”16

LINGVOJ - LLENGÜES

- Ĉu Ukrainio ekparolas pli ofte en la ukraina?.....21

LITERATURO - LITERATURA

- Beletroj de junuloj..... 22
- La eta talpo en Esperanto 25

HISTORIO/MEMORO - HISTÒRIA/MEMÒRIA

- Jordi Carbonell i Pinyol (1933-2024)..... 27
- Joan Barceló Andreu 28

ANGULO POR KOMENCANTOJ

- Kial i ĉar..... 29

NIA AGADO – LES NOSTRES ENTITATS

- Raporto pri Kataluna Kongreso30
- Raportoj pri 109a UK en Tanzanio.....31
- Lasta agado de KEJ 33
- Agado de KEA en 2024 35

VILAĜO ESPERANTO

- Esperantaj Podkasto..... 39

Kataluna Esperantisto és una publicació semestral en català i esperanto de l'Associació Catalana d'Esperanto sobre els drets lingüístics, les llengües de relació internacional, les llengües minoritzades i la història i actualitat de l'esperanto i de les llengües planificades.

revuo-ke@esperanto.cat

Edita: Associació Catalana d'Esperanto
Apartat 1008 - 08204 Sabadell
Papa Pius XI, 130 - 08208 Sabadell
www.esperanto.cat
info@esperanto.cat

Consell de redacció: Pere Fornells,
Xavier Alcalde, Nicolau Dols, Xavier Margais,
Pedro M. Martín Burutxaga, Òscar Puig,
Alfons Tur, Carles Vela, Sandra Vives

Assessorament lingüístic: Siru Laine,
Pedro M. Martín Burutxaga (esperanto),
Anna Maria Muñoz Morata (català)

Composició: Ferriol Macip i Bonet

ISSN de l'edició en paper: 2014-8364

ISSN de l'edició electrònica: 2014-8372

Dipòsit legal: B-27362-1982

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

President/Prezidanto: Alfons Tur,
Vicepresidenta /Vicprezidanto: Sandra Vives,
Secretària/Sekretario: Maria Sánchez,
Tresorera/Kasisto: Clara Casanovas,
Vocals/Voĉdonantoj: Jordi Aguilar,
Mon Cardona, Albert Claret, Lluís de Gibert,
Antoni Gimeno, Òscar Hernández, Siru Laine,
Ferriol Macip, Enric Pineda, Sebastià Ribes,
Sílvia Soler, Carles Vela, Representan de KEJ/
Reprezentanto de KEJ: Òscar Hernández.

JOVENTUT CATALANA D'ESPERANTO/ KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO

President/Prezidanto: Òscar Hernández,
Vicepresident - Vicprezidanto: Joan Visa,
Tresorer/Kasisto: Jordi Calafi,
Secretari/Sekretario: Isaac Giménez,
Representant a TEJO/ Komitatano A en TEJO:
Lucia M. Fernández, Relacions exteriors/
Eksteraj rilatoj: Jaime Tapia.

Pri la enhavo de la kontribuoj responsas la aŭtoroj mem. Nur la redaktora saluto esprimas opiniojn de la eldonisto KEA.

Els autors que signen els articles són els responsables dels seus continguts. L'opinió de KEA només s'expressa a través de l'editorial

Tots els articles estan subjectes a llicència Creative Commons Reconeixement-NoComercial-SenseObraDerivada 2.5 (<http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/2.5/es/legalcode.ca>). Està permès de reproduir-los i distribuir-los, sempre que es faci sense afany de lucre i se'n reconegui explícitament els autors, i l'Associació Catalana d'Esperanto com a editora

Imprès a: Recordgraf, C/ Mandoni, 6
08004 Barcelona

REDAKTORA SALUTO



Pere Fornells

Els darrers anys hem pogut veure amb molt de goig el re-
viscolament de KEJ. El nostre
jovent torna a estar actiu i amb mol-
ta empenta. Aquesta és per tant una
bona oportunitat per explorar com
viuen l'esperanto les noves genera-
cions de parlants. Avui dia tot canvia
molt de pressa i ells han crescut en un
món que s'assembla ben poc al de la
infància dels seus pares, no diguem
dels avis. L'anterior president de KEJ,
en Jordi Calafi, ja em va suggerir
tractar aquest tema temps enrere.
En aquell moment no va ser possible,
però l'ocasió no es podia deixar pas-
sar. Aquí teniu un tast de com és avui
la junulara movado. Esperem que us
agradi.

Per altra banda, ens cal comentar que
al *Kataluna Esperantisto* anem curts
de recursos. Si voleu col·laborar-hi
d'alguna manera, podeu contactar
amb nosaltres. Per exemple: escri-
vint petites cròniques de les nostres
activitats o esdeveniments, o fent
traduccions, o proposant una secció
nova que us sembli que podríeu fer,
o qualsevol altra idea que tingueu. Us
recordo la nostra adreça electrònica:
revuo_ke@esperanto.cat

D'ara endavant, si no hi ha canvis,
reduïrem la nostra periodicitat a un
exemplar l'any. Aquest, demanem
disculpes, sabem que us arriba amb
retard. La previsió pel proper és fer-
vos-el arribar a finals de 2025.

Cordialment,
Pere

Dum lastaj jaroj ni povis kun
granda ĝojo vidi la reviviĝon
de KEJ. Nia junularo de-
nove estas aktiva kaj tre vigla. Tiu
estas, do, bona ŝanco por esplori
kiel la novaj generacioj de parol-
antoj spertas Esperanton. Nuntempe
ĉio ŝanĝiĝas tre rapide: ili kreskis en
mondo, kiu apenaŭ similas al tiu de la
infanaĝo de iliaj gepatroj, des malpli
de la geavoj. La antaŭa prezidanto de
KEJ, Jordi Calafi, jam antaŭ iom da
tempo sugestis al mi pritrakti ĉi tiun
temon. Tiam ne eblis, sed oni ne povis
preterlasi la ŝancon. Jen bildeto de la
hodiaŭa junulara movado. Ni esperas,
ke tio plaĉos al vi.

Aliflanke, ni devas rimarki, ke al ni
en *Kataluna Esperantisto* mankas
rimedoj. Se vi volas kunlabori kun
ni iamaniere, vi povas kontakti nin.
Ekzemple: verkante mallongajn kro-
nikojn pri niaj agadoj aŭ eventoj, tra-
dukante, proponante novan rubrikon,
kiun vi povus prizorgi, aŭ ajnajn
aliajn ideojn. Ni memorigas al vi nian
retadreson: revuo_ke@esperanto.cat.

De nun, se nenio ŝanĝiĝos, ni reduk-
tos nian eldonadon al unu numero
jare. Ĉi tiun numeron, ni scias kaj
pardonpetas, vi ricevas malfrue. Ni
antaŭvidas sendi la sekvontan al vi
fine de 2025.

Amike salutas,
Pere

”

El nostre jovent
torna a estar actiu
i amb molta empenta.
Aquesta és per tant
una bona oportunitat
per explorar
com viuen l'esperanto
les noves generacions
de parlants

”

Nia junularo
denove estas aktiva
kaj tre vigla.
Tiu estas, do,
bona ŝanco
por esplori kiel
la novaj generacioj
de parolantoj
spertas Esperanton

L'ESPERANTO: UNA GRAN AJUDA PER A L'ERASMUS I LA MOBILITAT UNIVERSITÀRIA

Jordi Calafi
KEJ

BRASIL

Cada any, milers d'estudiants catalans marxen a l'estranger gràcies al programa Erasmus, una experiència acadèmica que va molt més enllà de les aules. L'adaptació als països d'acollida depèn de cada persona, però alguns de nosaltres, gràcies a l'Esperanto, hem pogut integrar-nos encara millor i viure experiències úniques de primera mà. Gràcies a la comunitat esperantista local, hem trobat un punt de connexió amb persones d'arreu del món, que ens han obert les portes de casa seva, les seves trobades i el seu dia a dia. A continuació hem recollit alguns testimonis de membres de KEJ que comparteixen les seves vivències a diferents països i continents.

JORDI SOLSONA SANJUAN: La 1an de februario 2023 mi prenis aviadilon al urbo de Rio-de-Janeiro, al kiu mi havis la plezuron surteriĝi la sekvon vesperon. Ekde tiam, atendis min ses monatoj de Erasmus+ en ĉi tiu mirinda urbo. Kelkaj semajnoj poste mi pensis kontakti la lokajn esperantistojn. Mi jam sciis, ke en Brazilo esperantismo estas sufiĉe forta movado; mi aŭdis, ke ĝi estas unu el la plej esperantistaj landoj de la nunaj tempoj. Tiel mi finfine parolis kun Matheus Arantes, kun kiu mi renkontiĝis post kelkaj tagoj en la Centro Cultural Banco do Brasil (CCBB), kune kun esperantistaj amikoj, kiujn li prezentis al mi. Ĉiuj el ili estis tre gastamaj. Kun ili mi malkovris la popularecon de tablo-ludoj inter la junuloj de la Karioka Esperantista Junulara Organizo (KAREJO); ĝi vere estas ŝatokupo, kiu plenigas grandan parton de iliaj hazardaj renkontiĝoj! Mi havis la bonŝancon renkonti ilin duafoje en la urbocentro, kiam ni iris kune tagmanĝi kaj pasigi tempon. Estis sperto, kiun mi tre dankis kaj kiun mi ne hezitus ripeti, se mi revidus ilin. Entute, mi estas tre dankema al ili, ĉar ili estis tre gastamaj kaj afablaj. Ili reflektis tion, kion la brazila popolo transdonis al mi ekde la unua momento, kiam mi paŝis sur ilian teron: afablecon, malfermecon kaj bonvenigon kun malfermitaj brakoj kiel neniam!

L'1 de febrer del 2023 vaig prendre un avió cap a la ciutat de Rio de Janeiro, a la qual vaig tenir el plaer d'aterrar el dia següent al vespre. Des d'aleshores, m'esperaven sis mesos d'estada d'Erasmus+ en aquesta meravellosa ciutat. Unes poques setmanes després vaig pensar a contactar amb els esperantistes del lloc —jo ja sabia que al Brazil l'esperantisme era un moviment força present; havia sentit que era un dels països més esperantistes dels temps presents—. Així, vaig acabar parlant amb en Matheus Arantes, amb qui em vaig trobar uns dies després, al Centro Cultural Banco do Brasil (CCBB), juntament amb companys esperantistes als qui em va introduir. Tots ells van ser molt acollidors. Amb ells vaig descobrir la popularitat dels jocs de taula entre els joves de la Karioka Esperantista Junulara Organizo (KAREJO), i és que és realment un passatemps que omple bona part de les seves trobades casuais! Vaig tenir la sort de poder trobar-me amb ells un segon cop al centre de la ciutat, quan vàrem anar junts a dinar i passar l'estona. Va ser una experiència que vaig agrair molt i que no tindria inconvenient a repetir si els tornés a veure. Tot plegat, els estic força agraït: varen ser molt hospitalaris i amables; reflectiren el que la gent brasilera m'ha transmès des del primer moment que vaig trepitjar la seva terra: amabilitat, obertura i rebuda de braços ben oberts com no havia vist mai!



Jordi Solsona Sanjuan

ALEMANYA

LUCÍA MONTSERRAT FERNÁNDEZ BARRERA: En arribar a Alemanya, vaig tenir la sort de ser inclosa al grup de Telegram de GEJ (Joventut Alemanya d'Esperanto) gràcies a una esperantista amb la qual havia parlat en una trobada internacional aquell estiu que recordava que jo feia l'Erasmus allà. Ser part d'aquell grup em va permetre saber quines trobades es feien a Alemanya durant aquells mesos. Un membre d'aquell grup va ser qui em va informar sobre un grup esperantista a la meua ciutat, Karlsruhe, que es reunia una vegada al mes per sopar junts i em va animar a anar-hi la següent vegada, ja que ell, a qui havia vist una vegada també a una IJK, hi aniria. Malauradament, només vaig poder participar una vegada en aquesta trobada mensual, però va ser molt divertit i molt interessant, ja que a més a més de conèixer noves persones, em van explicar curiositats de la regió, així com menjars tradicionals i altres curiositats del país. Gràcies a l'amabilitat d'una altra amiga esperantista alemanya que em va acollir a casa seva una nit, vaig tenir la possibilitat de visitar altres ciutats, mercats nadalencs i conèixer gent nova.

Kiam mi alvenis en Germanion, mi havis la bonŝancon esti inkluzivita en la telegram-grupon de GEJ danke al esperantisto, kiu memoris, ke mi faras Erasmus tie; dank' al tio mi povis scii, kiaj kunvenoj okazis en Germanio dum tiuj monatoj. Unu membro de tiu grupo informis min pri esperantista grupo en mia urbo, Karlsruhe, kiu kunvenis unufoje monate por vespermanĝi kune. Bedaŭrinde mi povis partopreni nur unufoje, sed estis tre amuze kaj tre interese, ĉar krom renkonti novajn homojn, ili ankaŭ rakontis al mi kuriozaĵojn pri la regiono, kaj ankaŭ tradiciajn manĝaĵojn kaj aliajn tradiciojn. Ankaŭ danke al germana esperantista amikino, kiu akceptis min en sian hejmon, mi havis la ŝancon vidi aliajn urbojn, viziti kristnaskajn merkatojn kaj renkonti novajn homojn.



Lucía Montserrat Fernández Barrera

L'1 de febrer del 2023 vaig prendre un avió cap a la ciutat de Rio de Janeiro, a la qual vaig tenir el plaer d'aterrar el dia següent al vespre. Des d'aleshores, m'esperaven sis mesos d'estada d'Erasmus+ en aquesta maravillosa ciutat.





Pol Jimenez Isach



Jaime Tapia Zaragoza

BRAZILIO

POL JIMENEZ ISACH: Kiam mi alvenis en Brazilon, mi bonŝancis loĝi kun Jordi Solsona, kiu transloĝiĝis al Rio kelkajn monatojn antaŭ mi. Li prezentis min al WhatsApp-grupoj de BEJO, specife al KarEJO (sekcio de BEJO en Rio-de-Janeiro). Danke al ĉi tiu kontakto, mi komencis paroli en la grupo kaj interesiĝis pri iliaj agadoj. Unu renkontiĝo estis planita por konatiĝi unu kun la alia. Tiam preskaŭ dek homoj iris al parko por ludi tabloludojn kaj babili pri malsamemecoj inter la movado en Brazilo kaj en Katalunio. Estis tre interese scii, ke en Brazilo estas multaj Esperanto-parolantoj, ĉar multaj homoj el la spiritisma religio lernas Esperanton. Bedaŭrinde la movado en Rio ne estas tiel forta, kaj la asocio ne estas tre aktiva por fari agadojn. Tamen, homoj en la asocio kutime iras al lingvokafejo Mundo Lingvo por babili en diversaj lingvoj kaj por disvastigi Esperanton. Bedaŭrinde mi ne povis partopreni ĝin kun aliaj esperantistoj de tie.

MADRID

JAIME TAPIA ZARAGOZA: El meu grau és interuniversitari, és a dir, es fa entre diverses universitats de tot l'Estat. Per tant, l'any passat vaig haver de marxar cap a Madrid per estudiar durant un any a la Universidad Autónoma de Madrid i a la Universidad Carlos III de Madrid. El canvi no em feia gens de por. Era semblant al que havia hagut de fer quan m'havia mudat a Barcelona. Una de les coses que més em tranquil·litzava i que més em tranquil·litzava ara que enfronto el meu tercer trasllat acadèmic (en aquest cas, a París) és el fet que vagi on vagi —sempre que no sigui a una ciutat massa petita, és clar—, trobaré algun grup local esperantista amb qui fer contacte i a qui acudir en cas de necessitat o buscant consell.

En el cas de Madrid, l'activitat del moviment esperantista es concentra en unes trobades que es celebren cada primer dissabte de mes a un petit restaurant de pops anomenat "O Miño", el qual es troba, com no podia

ser d'una altra manera, al carrer Esperanto, a l'est de la ciutat. Malgrat que, malauradament, la majoria de les vegades jo fos l'únic jove present, vaig gaudir molt amb les trobades i vaig conèixer gent molt interessant i molt compromesa amb el moviment, que va fer la meva estada a Madrid una mica més agradable i enriquidora!

CANADÀ

JORDI CALAFÍ FRANQUESA: Dum mia Erasmus en Montreale (Kebekio), mi havis la ŝancon senti min bonvenita de la lokaj esperantistoj kaj senti min kiel parto de la kebekia esperantista familio. Feliĉe, mi povis koni kebekianojn en la pasinta IJK kaj en antaŭaj UKoj, kiuj ekde la komenco informis min pri la agadoj kiujn ili organizis kaj kiel resti aktiva en la eventoj. Ĉiujn dekin tagojn, ĉu varmege, ĉu malvarme, ĉu pluvo aŭ neĝo, la montreala espe-



Jordi Calafi Franquesa

rantistaro organizis vespermanĝon ĉe Résto Vego, ĉarma restoracio en la centra kaj romantika Rue Saint Denis, kie ni kundividis konversaciojn en Esperanto, vidpunktojn, pensojn... Tiuj ĉi renkontiĝoj estis multe pli ol simplaj lingvaj kunvenoj; ili fariĝis homaj konektaj spacoj, kie kreiĝis ligoj inter generacioj, denaskaj kebekianoj kaj nov-alvenintoj kiel mi. Danke al la partoprenantoj kiuj konstante ĉeestis, ili montris al mi kiel estas la ĉiutaga vivo en Montrealo, kiel pli bone integriĝi en la lando, ktp.

Krome, mi povis viziti grandan parton de la kebekia teritorio kun aliaj esperantistoj kiuj afable invitis min al siaj hejmoj. Mi povis viziti Saguenay kaj Kebekurbon danke al Kamila kaj Taŝila, du fratinoj kiujn mi konis en la IJK en Italio kaj kiuj montris al mi la kebekian aŭtunon, la lokajn manĝaĵojn, la festojn, la pejzaĝojn, la universitatan vivon... En Granby (du horojn de Montrealo) gastigis min la aminda geedza paro Nor-

mand kaj Zdravka. Tie ni komencis prepari la Kristnaskon kaj mi povis konatiĝi kun la faŭno kaj flaŭro de la regiono kun la plej bonaj gvidoj. En Montrealo, Gabriel montris al mi la 'castellers'-komunumon (jes, mi renkontis kebekian 'casteller', kiu lernis la katalunan kaj parolas ĝin pli bone ol mi) kaj la ligojn inter Kebekio kaj Katalunio. Fakte, mi malkovris

multajn similecojn inter la esperantista movado en Kebekio kaj en Katalunio, rilate kaj al organiza nivelo kaj al la komuna nacia sento. Ĉiufoje ili instigis min ke ni en Katalunio organizu UK-n aŭ IJK-n kiel ili faris. Tiu ĉi sperto sendube plifortigis mian ligojn kun Esperanto kaj igis min senti ke mi havas familion ĉe la alia flanko de Atlantiko.

CONCLUSIÓ

Per als estudiants catalans que hem decidit aprofitar l'Esperanto durant el nostre Erasmus, aquesta llengua ha estat molt més que un simple mitjà de comunicació. S'ha convertit en una porta d'entrada a la gent local, que ens ha ofert una acollida càlida i genuïna. Aquestes experiències han enriquit molt més la nostra estada a l'estranger, demostrant com l'Esperanto pot esdevenir una xarxa de suport i amiatat que traspasa fronteres i fa del món un lloc més connectat i accessible. ■

DE KIE KAJ KIEN? EPOKOJ DE LA JUNULARA MOVADO DE ESPERANTO

Tyron Surmon
Prezidinto de TEJO



Por kompreni kie nun staras la junulara movado kaj kien ni iros, tre utilas komenci per retrospektivo de nia propra historio. La junulara movado havas kelkajn specifajn “epokojn”. En la nuna artikolo mi provizos historian skizon de tiuj epokoj, kaj poste priparolos kelkajn tendencojn kiujn mi nun vidas – por doni indikon pri kien eble iros la junulara movado post 5, 10 aŭ 20 jaroj.

ĈIUJ NI ESTAS JUNULOJ

Komence la tuta Esperanto-movado estis tre junulara. Zamenhof kreis la lingvon kiel 17-jaraĝulo kaj publiki-

gis la Unuan Libron kiel 28-jaraĝulo. Hector Holder estis 20-jaraĝa kiam li iĝis redaktoro de la revuo Esperanto kaj 21-jaraĝa kiam li kunfondis UEAn (la Universala Esperanto Asocio). Kaj ĝenerale kiel ĉiuj novaj sociaj movadoj, la plejparto de la anoj estis junuloj. Laŭ statistikoj de la 20aj jaroj, pli ol duono de la tiamaj esperantistoj estis malpli ol 30-jaraĝaj, kompare al malpli ol 20% nun¹.

Alivorte, mi nun estas 25-jaraĝa. Antaŭ 100 jaroj, en la movado mi estintus tute averaĝa. Se vi metus ĉiujn esperantistojn en la mondo en granda vico, antaŭ jarcento pli-malpli duono estus pli juna kaj duono pli maljuna ol mi, kaj multaj samaĝaj. Se vi farus la saman ekzercon nun, ne nur la tuta vico estus signife malpli granda² sed la aĝstrukturo ankaŭ estus tuta malsama. Almenaŭ 90% (kaj eble

1 Konata 1927 esploro de Tanquist, kompare al propra analizo de UEA-membrostistikoj por 2024

2 Pli malpli duono de la grandeco. La plej fidinda moderna takso (de Svend Nielsen en 2018) estas 62 mil parolantoj kaj laŭ fama cenzo en 1928, Dietterle taksis 127 mil parolantojn

eĉ 95%)³ de esperantistoj estus pli maljunaj ol mi.

Entute, ne ekzistis aparta junulara Esperanto-movado, ĉar Esperanto *jam* estis movado ĉefe por junuloj. Kompreneble la difinoj de “junulo” ŝanĝiĝis multe dum la jaroj, ja estis multaj maljunaj eminentuloj en la movado, kaj oni povintus konsideri 25-jaraĝulo kiel tutordinara plenkreskulo antaŭ jarcento. Sed nedebateblas ke kaj objektivaj kaj relative, la Esperanto-movado estis multe pli junulara dum tiu epoko.

POR JUNULOJ SED NE PER JUNULOJ

La signifo de “junularo” forte ŝanĝiĝis dum la jaroj. Kvankam TEJO fondiĝis en 1938, ankoraŭ ekzistas hodiaŭ kaj tenas la saman nomon (preskaŭ, estis ‘TJO’ ĝis 1952), gravas konstati ke “junularo” estis tre malsama koncepto tiam kompare al nun. Tiuepoke agado por “junuloj” preskaŭ ĉiam nur estis por infanoj, lernejoj kaj adoleskantoj – malofte pli aĝa ol 15/16 – kaj preskaŭ ĉiam iniciatis ĝin nur plenkreskuloj, gepatroj kaj instruistoj. La junuloj estis pasaĝeroj, sed ne mem ankoraŭ la stirantoj.

Ekzemple, la gesinjoroj van Veenendaal estis 36 kaj 48 jaraĝaj kiam ili fondis La Juna Vivo (la tiama ĉefa revuo de TEJO – parenteze ĉiuj numeroj nun disponeblaj en la reto, kies skanado mi gvidis⁴) kaj 40 kaj 52 jaraĝaj kiam ili kunfondis TJOn. Aŭ por la unua IJK en 1938, la averaĝa aĝo estis 14 (ĉi-jare en Litovio estis 28), la plejparto de la partoprenantoj venis kun sia tuta lerneja klaso, kaj neniuj ĉeestantoj – krom la instruistoj kiuj prenis siajn klasojn – estis pli aĝa ol 19. Konsidere tion, eble ne surprizas ke eksplicita regulo por la IJK 1939 estis ke ĉiuj devas enlitiĝi je la 10a kaj ellitiĝi je la 7a.

LA NASKIĜO DE “PERJUNULARA” JUNULARA MOVADO

Ĉirkaŭ 1960 okazis ekeksisto de la nova koncepto pri la “junularo” en la disvolviĝintaj landoj, ĉefe en Eŭropo. Pro la alta ondo de naskiĝoj tuj post la dua mondmilito, kiam la 60aj jaroj komenciĝis, estis senprecedenca granda kvanto de adoleskantoj kaj junuloj, relative al aliaj aĝgrupoj en socio, kiuj kreskis dum la “ora epoko” de postmilita ekonomia kresko. Pro tio estis granda ŝanĝo en la rilatoj inter la generacioj, naskiĝo de propra specifa “junulara” kulturo, kaj la unua fojo ke la junularo vere konsciiĝis pri si mem kaj organiziĝis kiel aparta grupo en socio. Tiaj tendencoj respeguliĝis en la Esperanto-movado.

Oni anstataŭis la laman agadon de la 50aj jaroj kun multe pli vigla junulara movado dum la 60aj jaroj. La IJKoj iĝis multe pli grandaj kaj imponaj, la junuloj mem faris ĉion en sia propra movado por la unua fojo, kaj tiu ĉi epoko spertis la fondon de Kontakto en 1963 kaj de KER (Komisiono de Eksteraj Rilatoj) en 1960. La pinta mejloŝtono estis la 1969 ‘Deklaracio de Tyreso’ kiam TEJO deklaris ke ili ne nur agadus pri la lingva problemo, sed ankaŭ engaĝiĝos pri sociaj kaj politikaj problemoj (eble ŝajnas iom banala nun, sed estis grandega paŝo tiutempe).

Resume, eĉ se de organiza vidpunkto (pri TEJO kaj la IJK) ni spuras nian originon al la antaŭmilita periodo, klare de sociologia vidpunkto la junulara movado kiel ni komprenas ĝin hodiaŭ estas pli juna, ekde la 1960aj jaroj. Almenaŭ la agadoj kiujn ĉefe karakterizas la junularan movadon hodiaŭ, ĉefe naskiĝis tiam.

LA VENKO DE RAŬMO

Dum la IJK en Raŭmo, Finnlando en 1980, oni proklamis la ‘Manifesto de Raŭmo’. Oni deklaris ke “la oficialigo de Esperanto estas nek verŝajna nek esenca” kaj la Esperanto-movado devus havi alternativajn celojn, nome promocii ‘novtipan internacian kulturon’ kaj prezenti Esperanton ‘kvazaŭ la apartenon al mem elektita diaspora lingva minoritato’. Nuntempe, kvankam kelkaj homoj kon-

”

Ĉirkaŭ 1960 okazis ekeksisto de la nova koncepto pri la “junularo” en la disvolviĝintaj landoj, ĉefe en Eŭropo

”

La pinta mejloŝtono estis la 1969 ‘Deklaracio de Tyreso’ kiam TEJO deklaris ke ili ne nur agadus pri la lingva problemo, sed ankaŭ engaĝiĝos pri sociaj kaj politikaj problemoj

”

De sociologia vidpunkto la junulara movado kiel ni komprenas ĝin hodiaŭ estas pli juna, ekde la 1960aj jaroj

3 Propra takso surbaze de UEA-membros-tatistikoj

4 “Centoj da numeroj de “La Juna Vivo” alireblaj al ĉiuj! - Enmovade #15” en la tejo-esperanto jutubkanalo

traŭas ĝin kiel “falsa binaro”, oni ĉefe agnoskas ‘Raŭmismon’ kiel la malo de ‘Finvenkismo’, por subteni la komunumon kaj kulturon de Esperanto kiel celo en si mem, anstataŭ ankoraŭ kredi (kaj mem agadi por) ke Esperanto devus esti ĉies dua lingvo.

Klare la deklaroj de la Manifesto de Raŭmo pravas. Oni ne oficialigis Esperanton en la 80aj jaroj, kaj preskaŭ certe oni neniam faros tion. Almenaŭ inter junaj parolantoj de Esperanto en Eŭropo (miaj kutimaj kunuloj en Esperantujo, kaj la legantoj de tiu ĉi artikolo) apenaŭ iu ajn serioze kredas ke Esperanto iĝos la dua lingvo de la mondo. Tamen, ni ĉiuj ankoraŭ kredas ĝin io utila, valora kaj inda. Kaj ni ankoraŭ strebas varbi homojn al nia movado, pliriĉigis kulturon kaj kreski la kvanton de parolantoj – kun notinda sukceso. Ekde la 80aj jaroj la kultura vivo de Esperantujo certe iĝis pli vigla, almenaŭ laŭ la kvanto de eventoj, muzikgrupoj, kantoj kaj originalaj romanoj. Kaj la daŭra ekzisto de la junulara movado mem (kie oni devas konstante varbi novajn membrojn, por anstataŭi tiujn kiuj pliaĝiĝas) malgraŭ la eksvalidiĝo de tiuj tradiciaj celoj, montras ĝian vivemon.

KIE NI STARAS NUN?

Do...ĉu punkto-fino? La junulara movado jam atingis sian finan evoluon, kaj ĉio feliĉas kaj senŝanĝas? Iusence, sed ne. Kvankam ni ankoraŭ ekzistas en la kunteksto de Raŭmo (almenaŭ ne ankoraŭ ekzistas klara kvina “epoko” post tio) estas spuroj de aliaj novaj tendencoj en la junulara movado de Esperanto. Kvankam ili ne ankoraŭ plene disvolviĝis, ili eble montros al ni kiel nia movado aspektos estonte.

NOVAJ TENDENCOJ

Epoko de subvencioj

Subvenciita agado ne estas nova en la junulara movado. Jam ekde la

70aj jaroj TEJO ricevis subvenciojn por organizi seminariojn (ĉefe en Strasburgo) pri diversaj temoj. Aŭ la delonga sukceso de GEJ (la Germana Esperanta Junularo) parte venas dank’ al la malavareco de la germana ŝtato, kiu dum jardekoj eĉ pagis la kostojn de negermanoj ĉeesti eventojn en Germanio.

Tamen, kvankam la koncepto ne novas, la lastatempa etendo de tiuj subvencioj senprecedentas. Antaŭ 10 jaroj TEJO (la koro de la junulara movado) havis jaran buĝeton de 20 mil EUR, unu oficisto kaj unu volontulo. Ĉi-jare ĝi havas buĝeton de 200 mil EUR, 5 oficistoj kaj 3 volontuloj – dankon al la Eŭropa Unio mi supozas. Kvankam multaj belaj atingoj fontas de tio (ekz. Esperanto Senlime) estas malferma demando kiel tiu nova stato efikis la junularan movadon. Mi ne nepre vidas grandan fortigon de nia movado kompare al antaŭ kelkaj jaroj, kiam ni havis multe malpli da subvenciado. Sed eble inverse kiel rultapiŝo, oni devas kuri multe simple por resti en la sama loko. Kiu prenas nin al nia sekva punkto...

Epoko de malgrandiĝo

La junulara movado malgrandiĝas. Antaŭ 15 jaroj niaj eventoj en Eŭropo ĉiam superis 300 partoprenantojn, kaj foje eĉ 400. Nuntempe ni luktas atingi eĉ 200. Mi ege ĝuis la IJKojn en Slovakio (2019), Nederlando (2022), Italio (2023) kaj Litovio (2024). Sed ili ĉiuj havis nur inter 188 (Litovio) kaj 233 (Nederlando) partoprenantojn. La sama tendenco batas JES - la lasta JES kun pli ol 250 partoprenantoj okazis en 2017. Certe ankoraŭ estas “sojla amaso” por havi bonegan eventon. Sed mi miras ĉu ia vicleco mankas por tiu ŝrumpiĝo.

Ne estas klara interkompreno pri la kialoj. Laŭ mi, verŝajne demografiaj faktoroj plej efikas tion. Ĉie en Eŭropo la kvanto de naskiĝoj falis, kaj se estas malpli da naskoj, poste estos malpli da junuloj por ĉeesti Esper-

antajn eventojn. Certe ni povus strebi “malŝlosi” novajn publikojn kiuj interesiĝas pri Esperanto (konsidere ke ĝuste nun estas la “sankta triopo” de lingvemuloj, komputilistoj kaj gejoj). Sed se ni ne sukcesas pri tio, tiu tendenco de ŝrumpiĝo verŝajne daŭros.

Epoko de la interreto (kaj postpandemio)

En 2015 oni aŭguris ke la lanĉo de la Duolingo-kurso pri Esperanto tute ŝanĝos nian movadon kaj enkondukos grandan ondon de novaj esperantistoj. Tio ne okazis. Ne estis tuta malsukceso - mi mem aliĝis la kurson dum sia unua semajno (eĉ se mi ajnokaze planis lerni la lingvon antaŭe) kaj ĉefe lernis per tio. Sed klare la promesita tero neniam videbliĝis. Kiel dirite supre, kiel rultapiŝo oni devas kuri multe por resti samloke. Do bonkvalitaj retaj kursoj necesis por varbi novajn parolantojn, sed ne sufiĉas por tute ŝanĝi la kvanton de parolantoj.

Egale oni kredis ke la surretigo de ĉio dum kaj post la pandemio specife helpas la Esperanto-movadon. Konsidere ke ni ĉiuj loĝas ĉirkaŭ la mondo kaj niaj lokaj kluboj ajnokaze mortas aŭ baldaŭ mortos, oni esperis ke la tutmonda komunumo kiun la reto povus krei, perfektas por la tutmonda komunumo de Esperanto. Tamen laŭ ajna indico, kvankam la Esperanto-movado eble ne ŝrumpis, ĝi ankaŭ ne kreskis. Mi ofte citas la enketon kiun UEA sendis al partoprenantoj de la 2023 Virtuala Kongreso. 57% de la respondantoj indikis ke ili jam ĉeestis pli ol 10 Universalaj Kongresoj, t.e. ke ĉiuj partoprenantoj jam estis ege aktivaj (kaj maljunaj) esperantistoj, kaj malgraŭ la propagando ĝi tute malsukcesis vere allogi novajn homojn.

Mi supozas ke la movado iĝis iomete pli internacia ol antaŭe pro la pandemio, kaj kelkaj homoj certe ekaktivigis dank’ al la reta agado. Sed mi iom dubas ke la longdaŭra efiko grandas.



Epoko de la angla

En la Manifesto de Raŭmo oni efektive agnoskis ke la angla venkis kiel la ununura lingvo por internaciaj rilatoj. Tamen, mi kredas ke la klara venko de la angla en ĉiutagaj interagoj trans landlimoj estas pli profunda kaj pli grand-skala ol kion oni prognozis tiam.

Eble mi pli rimarkas ĝin kiel denaskulo de la angla. Sed efektive ĉiuj junaj esperantistoj parolas la anglan. Niaj novaj vortoj kaj slangaĵoj plejparte venas de la angla. Ofte ni elektas esprimi ion en la angla, ĉar tro malfacilas diri ĝin en Esperanto. Laŭ enketo kiun nia historia projekto starigis dum IJK 2024⁵, preskaŭ duono de la ĉeestantoj esprimis ke ili pli bone parolas la anglan ol Esperanton, kaj aldona triono diris ke ili parolas la anglan kaj Esperanton “egale”. Nur kvarono de la enketiitaj ĉeestantoj esprimis ke ili parolas Esperanton pli bone ol la angla.

⁵ Surbaze de la provizoraj rezultoj (ne ankoraŭ endatumbaziĝis la tuto)

Mi supozas ke ne estas granda surprizo. Junaj esperantistoj ĉiuj estas edukitaj, kaj edukitaj homoj (almenaŭ en Eŭropo) en la moderna mondo parolas la anglan. Sed ŝajnas al mi ke oni ne ankoraŭ plene analizis kiel tiu fakto influas la Esperantomovadon.

LA KONKLUDO...?

Ne estas! Mi simple ĵetas ideojn kaj esperas starigi bonajn diskutojn. Iusence mi sentas ke mi atingis mian ‘mezaĝon’ kiel juna esperantisto. Mi jam aktive partoprenis la movadon dum 7 jaroj - inkluzive kiel TEJO-prezidanto - kaj verŝajne daŭre aktive partoprenos por aldonaj 7 jaroj (nun laŭ la TEJO aĝlimo mi ankoraŭ povus aktivi dum pliaj 10 jaroj, sed ni ĉiuj scias ke tiu aĝlimo estas sensenca...) Do mi kurioziĝas vidi kiel tiuj tendencoj kiujn mi listigis plie disvolviĝos, kaj antaŭĝojas vidi kiujn finfine meritas mencioni kiel memstara epoko en estontaj historiaj libroj pri nia movado! Ĝis tiam. ■

”

Mi kredas ke la klara venko de la angla en ĉiutagaj interagoj trans landlimoj estas pli profunda kaj pli grand-skala ol kion oni prognozis tiam

HISTÒRIA DEL MOVIMENT JUVENIL ESPERANTISTA ALS PAÏSOS CATALANS

Òscar Puig i Cánovas

Cofundador i primer president de KEJ



Escriure sobre història és sempre una tasca complexa i delicada, perquè és deixar escrit per al futur un relat d'uns fets que van succeir i que varen deixar una petjada més o menys nítida. Com més empremtes es trobin, més properes cronològicament als fets i més contrastades per fonts diverses, el relat resultant serà més fidel a la realitat.

Això ve a tomb perquè, illús de mi! vaig oferir-me a escriure una cronologia del moviment juvenil esperantista des Països Catalans després de la desfeta de la guerra civil espanyola, de la segona guerra mundial i de la llarga dictadura. El fet de ser esperantista des de la infantesa i haver estat cofundador i primer president de la Joventut Catalana d'Esperanto em

semblava que era un bagatge suficient per a aquesta feina, que equivocat que estava!

Quan començo a recopilar dades per aquesta cronologia, m'adono de la feblesa de la memòria, la meua i la dels companys d'aventures. Les contradiccions i l'embolic de dates i fets s'incrementa a cada nou record

pretasament fixat però, això, lluny de fer-me llançar la tovallola, m'ha esperonat per començar una feina rigorosa i sistemàtica per poder deixar documentada correctament aquesta apassionant història, però, és clar, això no es fa ni en un article a la revista ni amb uns dies de recerca, això és una feina d'anys de dedicació.

On començo la història? Parteixo de finals dels anys 40 del segle passat, perquè és quan comencem a tenir documentació escrita. El *Boletín de la Federación Española de Esperanto* (HEF) apareix el 1948, l'any següent a la fundació de l'entitat i el *Butlletí del Centre d'Esperanto Sabadell* comença a editar-se el 1957.

En el primer número d'aquest *Boletín*, amb un pompós i caspós llenguatge que recorda el No-Do, llegim que la *Federación Española de Esperanto* neix a València i només s'hi parla de dos grups locals, Terrassa i Reus. Curiosos... Lamentablement no es parla de joventut, encara. Caldrà esperar al 1959 quan en Salvador Aragay, amb cinc catalans més, funda a Barcelona HEJS (*Hispana Esperantista Junulara Sekcio*), la secció juvenil de HEF.

I seguirem amb els primers grups organitzats de joves que situem a principis dels anys 70 a Sabadell, d'una banda un nombrós grup infantil liderat per l'Eulàlia Giner i la Magda Clerch i un altre de juvenil encapçalat per en Sebastià Ribes, deixeble d'en Jaume Viladoms.

A finals de la dècada, HEJS agonitza i el grupet de joves catalans, bàsicament sabadellencs entre els quals m'hi compto, caiem en el típic parany de joventut de pensar que des d'aquí podem canviar Espanya i ens fem càrrec de l'entitat. Durem tres anys durant els quals queda més que clar que el moviment el tenim només aquí i ens llancem a la creació de KEJ, la Joventut Catalana d'Esperanto, de la qual en soc el primer president.

KEJ, en aquesta quarantena d'anys d'existència, n'ha vist de tots colors,

ha aconseguit grans èxits i ha passat per èpoques de pràctica hibernació. Al cap de pocs anys actuant com a secció juvenil de KEA, l'any 1988 es va independitzar i va ser reconeguda com a Secció Nacional de TEJO, l'Organització Mundial de la Joventut Esperantista. És l'única organització d'una nació sense estat en aconseguir-ho!

”

KEJ, en aquesta quarantena d'anys d'existència, n'ha vist de tots colors, ha aconseguit grans èxits i ha passat per èpoques de pràctica hibernació

KEJ va publicar durant 13 anys el butlletí *Kata-Luno*, nom sorgit del joc de paraules que ens feia l'enyorat company croat Zlatko Tišljarić, *Pajo* i *Frequències*, revista de llengües i pobles, entre al 1991 i el 1994.

Després d'uns anys d'inactivitat, el 2019, KEJ ressorgeix amb un nou equip molt dinàmic que relança com mai la seva activitat i aconsegueix fites inimaginables com esdevenir membre de ple dret, el 2023, del Consell Nacional de la Joventut Catalana. El mateix any s'organitza la primera RenKEJtígo amb una insòlita participació d'una seixantena de joves de 6 països.

Després d'aquest esbós, aprofito aquest espai per explicar què estic fent:

Buidat de publicacions (*Kata-Luno*, *Frequències*, *Kataluna Esperantisto*, *Esperanto*info*, *HEJS*, *HEJS-Juneco*, *Boletín*, *Sabadell Esperantista*, el *butlletí de l'esperanto*, *Ĉiesrevujino*, *Kontaktto*, *Esperanto*, *Jarlibro...*), cosa que implica recórrer a la magnífica Biblioteca-Arxiu Petro Nuez de Sabadell i anar passant pàgines, una a una, de totes aquestes publicacions a la cerca d'informació rellevant per a l'objectiu de l'estudi.

Recerca a Internet.

Recerca a documentació pròpia, arxius de KEJ i llibres d'actes.

Llistat cronològic de fets i activitats.

Llistat de totes les persones que van apareixent.

Llistat de la bibliografia utilitzada per tal de documentar les fonts de totes les activitats recollides.

Entrevistes escrites o presencials a les persones que han tingut un paper en la història.

Sí, és molta feina però penso que val la pena conèixer la història, saber com hem arribat fins aquí i per què, i deixar un llegat perquè les generacions actuals coneguin el passat i les futures puguin partir d'una base sòlida i documentada per seguir el camí

No sé quin format tindrà tot plegat, però la voluntat és que en un termini prudencial d'uns pocs anys, puguem tenir aquesta història disponible per a tothom. En Francesc Poblet i n'Hèctor Alòs, varen publicar el 2010 un recull d'articles amb el títol d'*Història de l'Esperanto als Països Catalans* i en Xavier Margais, el 2020, la *Breu història de l'esperantisme als Països Catalans*, ambdues obres m'estan servant per extreure informació, també. Cada dècada hem publicat història, a veure si abans del 2030 podrem tenir enllestida la Història de la Joventut Esperantista dels Països Catalans... ■

EN FILIPINOJ, ESPERANTON REGAS LA JUNULOJ

Albert Stalin Garrido
Geografo kaj instruisto



ALBERT STALIN GARRIDO

En landaj esperantistaj movadoj tra la mondo, oni ofte lamentas pri la manko de junuloj, kiuj povus transpreni la torĉon de la konstanta agado por disvastigi la internacian lingvon. Tamen, ĉu vi povus imagi lokon, en kiu la malo estus vera?

Tiu loko, kvazaŭ *insulo*, estas la esperantista movado en Filipinoj. Nejunaj esperantistoj, t.e., kiuj aĝas pli ol 35 jarojn (laŭ la difino de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, ne mia), povas esti kalkulitaj per unu mano, dum junuloj –adoleskuloj, universitataj studentoj kaj junaj profesiuloj – staras ĉe la fronto de la verda kaŭzo. Tio ĝuste estas la kazo de la Filipina Esperanto-Junularo (FEJ), la sola aktiva esperantista organizo en Filipinoj, fondita de tri gimnazianoj en 2013.

Filipinoj, laŭ amaskomunikiloj, posedas la titolon “la monda ĉeflando de sociaj retejoj” pro iu kurioza kialo. Statista, retejo kiu publikigas

statistikaĵojn kaj prognozojn, taksis ke 86,24 milionoj aŭ 78,18% de la loĝantaro de 110 milionoj uzis sociajn retejojn en 2023, kaj ke la averaĝa daŭro de taga uzado de sociaj retejoj, kiel *Facebook*, *Instagram*, *Twitter*, ktp., estis tri horoj. Tiujn ciferojn konfirmus preskaŭ ĉiu filipinano, kies fortaj familiaj kaj sociaj valoroj instigas tiun al regula interŝanĝo de vivrakontoj kun proksimumuloj. Aldoniĝas ankaŭ la fakto, ke filipina diasporo troviĝas tutmonde, kaj tiel iloj por rapida komunikado trans limoj kaj maroj iĝis eĉ pli nemalhaveblaj. Tamen, ĉar sociaj retejoj estas teknologio relative nova, ili restas plej alireblaj, kaj sekve plej popularaj, inter la plej junaj generacioj.

De tiuj faktoj profitis, kaj daŭre profitas, FEJ en siaj 11 jaroj de agado. La nuntempa filipina movado trovis sian modestan komencon en majo de 2013, kiam la 15-jara Albert Stalin Garrido, tiam komencanto de la lingvolerna retejo *Lernu!*, ekhavis la ideon starigi *Facebook*-grupon por teni kontakton kun aliaj sam-

landanoj, kiuj samtempe troviĝis en *Lernu!*, serĉinte vane aktivan lokan Esperanto-grupon. Li ankaŭ uzis *Facebook* por ekzerci sin pri lingvo-uzado, ofte afiŝante rakontetojn en la lingvo pri sia vivo kiel studento kaj adoleskulo inter siaj amikoj neesperantistaj, kio kun la paso de tempo vokis la atenton de siaj samlernejoj kaj vekis ilian scivolon pri ĉi tiu “ekzota” lingvo, kiu, antaŭ nespertaj filipinaj oreloj kaj okuloj, sonis kaj aspektis simile al la hispana lingvo. Unu afero kondukiĝis al alia, kaj la 19an de septembro de la sama jaro, Garrido, kun du aliaj amikoj el sia gimnazio kiujn li konvinkis al lernado, Jecel Marie Manabat (16) kaj Carl Joshua Quines (13), paktis la fondon de la Filipina Esperantista Junulara Asocio (FEJA) dum tagmanĝa paŭzo. FEJA poste ŝanĝis sian nomon en 2014 al la nun konata FEJ. La organizo, de tiam ĝis nun, agadas 90% rete, kaptante la atenton de junulara publiko per siaj bildoj kaj filmetoj.

La aktuala, tiu vivanta ekde 2013, ne estas la unua en la historio. En 1907



aperis la unua spuro de la internacia lingvo en la insularo, tiam ankoraŭ kolonio de Usono, kiam d-ro Herbert W. Yemans (1857–1920), kirurgo en la usona armeo, starigis la Filipinan Esperanto-Asocion (FEA). En la multaj registraĵoj pri tiu asocio kiuj travivis la tempon, oni menciis nenion precizan pri la partopreno de junuloj. La sola ĵurnalartikolo konata al ni, kiu raportis pri la fonda asembleo de FEA, rakontis la ĉeeston de “pluraj centoj da homoj”, sed poste oni sciis nenion pli pri la eventuala agado de la asocio; oni povas nur supozi ke en 1911, nur kvar jarojn poste, la movado renkontis iun preskaŭ certan finon kiam d-ro Yemans, fininte sian militservon en la kolonio, devis reiri al sia patrujo.

En la jarcento kiu sekvis, aperis malmulta informo pri postaj movadoj en Filipinoj, kvankam laŭ datumoj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj aliaj organizoj kaj rakontoj de veteranaj samideanoj, sporade aperadis unuopuloj kaj etaj, efemeraj grupoj sur la tutmonda movada mapo. Nur

99 jarojn poste okazis la sekva bone dokumentita reviviĝo, kiam la Azia Komisiono de UEA sendis Bharat K. Ghimire el Nepalo, kvazaŭ misiiston, por prezenti kaj instrui la lingvon en lokaj universitatoj kun la celo starigi novan landan E-asocion en la lando, mankantan dum tiel longa tempo. Tiu misio sukcesis, malgraŭ ĉiuj obstakloj, kun la fondiĝo de la Esperanto-Asocio por Filipinoj (EAPF) la 23an de septembro 2006 en la Filipina Norma Universitato (PNU) en la ĉefurbo Manilo. Tiu asocio tamen konsistis el universitataj profesoroj kaj aliaj akademias fakuloj, sed, rigardante la ankoraŭ travivantajn foton, neniuj junuloj. S-ro Ghimire poste foriris de la lando post tiu misio, kaj, sen vere entuziasmaj motoroj kiuj antaŭenpuŝis Esperanton preter puraj akademias intereso, EAPF mem forvelkis ene de kvin jaroj. Ties tiamaj gvidantoj, malgraŭ la posta reenkarigiĝo de la movado forme de FEJ, neniam denove aliĝis al la movado.

Katalunoj, aŭ almenaŭ tiuj kiuj partoprenis en mia ateliero organizita

dum RenKEJtiĝo 2024, scias, ke ekzistas alia Esperanto-grupo en la lando krom FEJ: la Esperanto-Societo de la Universitato de Filipinoj, alinome: “UP Esperanto-Societo”. Ĝi estas alia frukto de komunikado kaj propagando per sociaj retejoj: en 2018, unu persono, la sama kiu estis malantaŭ FEJA kvin jarojn antaŭe, publikigis retan malferman alvokon al samuniversitatanoj, plejparte nekonatoj, ĉu ili interesiĝus lerni novan lingvon kaj kunfandi Esperanto-klubon en tiu universitato. Kaj la cetero estis historio. Tiu klubo, pure student-iniciatita, helpis plifortigi la nocion ke en Filipinoj, Esperanton regas la junuloj kaj ĝian estontecon difinas la junuloj. En iu senco, tio plene kongruas kun la famaj vortoj de nia nacia heroo, d-ro José Rizal, kuracisto kaj poligloto ekzekutita de la hispana kolonia potenco sub la ordono de Madrido en 1896 pro liaj revoluciaj ideoj: “La junuloj estas la espero de la popolo.” Nu, d-ro Rizal, mi certas ke Zamenhof kaj vi estus bonegaj amikoj se vi nur estus renkontintaj unu la alian. ■

DAVID RUÍZ:

«Mi ne alproksimiĝis al Esperanto pro lingva intereso; mia amo al historio kaj la idealismaj valoroj de Esperanto vere ligis min al la movado»

Sandra Vives

Peranto, membre de la junta de KEA

Kiel vi unue malkovris Esperanton kaj kiel via studado influis vian rilaton kun la lingvo kaj lingvolernado ĝenerale?

Mi malkovris Esperanton hazarde en 2016 dum serĉado en Vikipedio por esplorlaboraĵo deviga en Katalunio. Tiam mi estis tre politikema kaj interesita pri historio, kaj Esperanto kaptis mian atenton pro ĝiaj idealoj. Post esplorado de la retejo de KEA, mi partoprenis aranĝon en Barcelono pri eŭska-Esperanto vortaro. Tie mi renkontis instruistojn Viktoro Solé kaj Rubeno Fernández, kiuj informis min pri Esperanto-kursoj. Mi atendis jaron por komenci, dum kiu mi esploris la historion de Esperanto en CES, kune kun Sebastia Ribes, kio estis mia unua paŝo en aktivado. Inter 16 kaj 17 jaroj mi pli interesiĝis pri la valoroj de Esperanto ol pri la lingvo mem. Mia ideologio kaj aktivismo tiam estis proksima al komunismo, kaj ĝi allogis min pro sia utopia flanko. Mi komencis mian unuan kurson en 2017 kaj en la somero de 2018 mi partoprenis SES (Somera Eaperanto-Studado) por akiri pli bonan lingvokapablon, kaj tie mi malkovris Esperantujon kaj la diversecon de kulturoj, kiun ĝi ofertas. Miaj studoj pri sciencoj de la antikeco ne estis la ĉefa kialo de mia eniro en Esperantujon, kvankam ili helpetis. Mi ne alproksimiĝis al



Esperanto pro lingva intereso; mia amo al historio kaj la idealismaj valoroj de Esperanto vere ligis min al la movado.

Kiajn ŝanĝojn vi observis en la kataluna Esperanto-movado ekde via engaĝiĝo, kaj kiajn defiojn kaj malfacilaĵojn vi identigas por la estonteco?

Mia perspektivo pri la evoluo de la kataluna Esperanto-movado estas nuancita, kaj mi ŝatus dividi ĝin laŭ du flankoj: la junulara kaj la ne-junulara. Kiam mi unue engaĝiĝis, mi malkovris, ke ekzistis junaj esperantistoj, sed ili ne estis organizitaj; KEJ ne estis aktiva. Unu el la unuaj paŝoj, al kiuj mi kontribuis, estis refondi la organizon, kunlabore kun helpo de Antoni Gimeno kaj Maria Sánchez, kiujn mi konis en la babilrondo okazinta en Gràcia (Barcelono). Ni sukcese revivigis KEJ, oni organizis universitatajn kursojn de Esperanto kaj mi vojaĝis kun novaj anoj al la IJK-oj; tio helpis nin amikiĝi, aktiviĝi kaj mobilizi novulojn. Ekde tiam, la plibonigoj en la movado estas tre rimarkindaj: nuntempe, kvin homoj el KEJ estas en la komitato de TEJO, kaj ĝi aktivigas regulajn renkontiĝojn kaj ĉiujaran aranĝon. Tamen, se ni rigardas la ne-junularan flankon, dum la lastaj jaroj la movado en la Kataluna Landaro travivis diversajn pozitivajn evoluojn, kiel ekzemple la SAT-Kongreso en Barcelono kaj la du lastaj Katalunaj Kongresoj. KEA ankaŭ plibonigis sian retejon, sociajn retojn kaj komercan bildon, sed malpliigis la asociisma aktiveco. Estas malofte okazantaj renkontiĝoj, kiuj proksimigas membrojn kaj subtenas komunumajn aktivecojn, kaj mi bedaŭras la malkreskon de Esperanto-kursoj. Tiaj defioj ne estas unike katalunaj, sed pro la historiaj kaj kulturaj aspektoj de nia lando estas urĝe solvi ilin. KEJ restas generacie la rekta estonteco de la Esperanto-movado en la Kataluna Landaro; ni ne povas tamen atendi, ke la nuna manko solviĝos, kiam ni pliaĝiĝos.

”

Unu el la unuaj paŝoj, al kiuj mi kontribuis, estis refondi KEJ, kunlabore kun helpo de Antoni Gimeno kaj Maria Sánchez

”

KEJ sukcesas allogi novajn membrojn kaj plibonigi sian strukturon, kio estas grava por ĝia daŭripovo kaj evoluo en la longa perspektivo.

”

TEJO estas organizo por packonstruado, kaj ĉiuj projektoj, kiujn mi subvencipetas, sekvas tiun ideon

Kio instigis vin akcepti la rolon de Komitatano A en TEJO, kaj kiel vi taksas la agadon de la kataluna junulara movado kompare kun aliaj landaj sekcioj de TEJO?

Post jaroj da plibonigo en KEJ, en 2020, mi iĝis Komitatano A en TEJO kiam ni rimarkis, ke la rolo ne estis aktiva. Mi estis la sola, kiu interesiĝis pri aktiveco, do mi decidis preni la iniciaton. Dum mia mandato ĝis 2022, mi respondecis pri reprezentado de la junulara Esperanto-movado en la Kataluna Landaro, interŝanĝante informojn en ambaŭ flankoj kaj partoprenante komitatkunsidojn, en kiuj ni parolis pri la estonteco de la organizo. Ĉi tiu sperto helpis min pli profunde kompreni la funkciadon de internaciaj organizoj. Pri la agado de KEJ mi observis, ke ĝi diferenciĝas de aliaj landaj sekcioj de TEJO. Dum multaj organizoj fokusigas sian energion sur unu grandan aranĝon jare, KEJ efektive laboras por diversigi siajn agadojn establane ĉiumonatajn renkontiĝojn, kunlaborante kun la Nacia Junulara Konsilio de Katalunio kaj organizante vintrajn aranĝojn kiel rezulto. Tiu etoso kreas novajn ideojn kaj oportunojn, kontribuante al pli da aktiveco en la organizo. KEJ sukcesas allogi novajn membrojn kaj plibonigi sian strukturon, kio estas grava por ĝia daŭripovo kaj evoluo en la longa perspektivo.

Kiel vi priskribas la projektojn, kiujn vi subvencipetas en TEJO, kaj kiel ili plibonigas la kapablojn de la membraro?

Por plenumi la rolon kiel subvencipetisto, mi partoprenis informsession en Bruselo, kie mi akiris multajn sciojn pri la subvenciprogramoj de la Eŭropa Junulara Fonduso rekte de respondeculo de la junulara departemento. Mi eklernis kiel funkcias la junulara departemento de Konsilio de Eŭropo kaj antaŭ mi

aperis granda defio por la venonta jaro: profesie spertiĝi, plibonigi mian anglan kaj mastri projektan ekde la verkado ĝis la raporto, inkluzivite pretigadon kaj implementigon. Ĉi tiu laboro kuntrenas esplori la necesojn de TEJO kaj ĝiaj membroj por ebligi projektojn valorajn por Esperanto el junulara vidpunkto. Mi ankaŭ konsideras la kunfluon de la prioritatoj de tiu departemento kun niaj celoj, provante kunigi tiujn elementojn respektante la limdatojn. La projektoj, kiujn ni konsideras, temas pri diversaj aspektoj, kiel kulturaj barieroj, interkulturaj dialogoj, lingvopolitikaj pozicioj, konfliktsolvado, neperforta komunikado, interkultura inklusiv-eco, kreado kaj disvolvado de podkastoj, migrado, seksa egaleco, daŭripoveco, forigado de barieroj, ktp. Ĉi tiuj iniciatoj helpas plibonigi la kapablojn de niaj membroj, igante ilin pli aktivaj kaj kompetentaj; tio povas profiti iliajn karierojn kaj personajn vivojn, eĉ se ili ne rekte rilatas al Esperanto. Laŭ la statutoj, TEJO estas organizo por packonstruado, kaj ĉiuj projektoj, kiujn mi subvencipetas, sekvas tiun ideon. Ankaŭ gravas, ke ĉi tiuj projektoj estu allogaj por junuloj.

Kiel vi antaŭenigas interkulturan kunlaboron kaj kunligon en via rolo kiel eksterrilatisto, kaj kiujn ĉefajn ŝancojn vi renkontas kun diversaj naciaj komunumoj?

Kiel respondeculo pri eksteraj rilatoj de TEJO mi konstatas, ke ĝi engaĝiĝas en multnombraj spacoj. Interalie, ni estas anoj de Forumo Junulara Eŭropa, internacia neregistara organizo, kiu kunigas naciajn junularajn konsiliojn kaj internaciajn neregistarajn junularajn organizojn en Eŭropo. La celo de ĉi tiu

forumo estas reprezenti asociojn kaj junularon al eŭropaj kaj internaciaj institutoj, kiel la Eŭropa Unio, Konsilio de Eŭropo kaj Unuiĝintaj Nacioj, interalie. Ĝi kunigas pli ol 105 organizojn, kiuj havas minimume kvin mil membroj. Per la reprezentantoj de TEJO ni alportas la valorojn, viziojn kaj misiojn de niaj organizoj por antaŭenigi junularajn politikojn, bezonojn kaj decidojn. Forumo Junulara Eŭropa estas la voĉo de la junularo en Eŭropo, kaj ĝi ludas gravan rolon en eŭropaj politikoj. Ĝi ofertas platformon por lobiumi pri la valoroj de TEJO, pere de ĝenerallaj asembleoj, konsilioj de membroj, internaj forumoj, fokusgrupoj kaj laborgrupoj, kie ni kunlaboradas kaj kundividigas opiniojn kun reprezentantoj de aliaj organizoj. Pere de Forumo Junulara Eŭropa ni voĉdonas por dudek el la tridek lokoj, kiuj estas destinitaj por junuloj en la junulara departemento de Konsilio de Eŭropo. La tasko de tiuj tridek junuloj estas dekreti normojn, rekomendi pri estontaj prioritatoj, programoj kaj buĝetoj kaj certigi, ke oni antaŭenigos kaj defendos junularajn vidpunktojn kaj bezonojn, kiel ekzemple la kampanjon por voĉdoni je deksesjariĝo. Unu el tiuj dudek estas TEJOano. Mi ankaŭ havas konsultajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj, tiel ke niaj aktivecoj ne limiĝas al Eŭropo. Tie TEJO kunlaboras kun UEA por antaŭenigi politikojn, kiuj disvastigas niajn komunajn valorojn. Sur regionaj niveloj ni kunlaboras kun Unuiĝinta Reto de Junaj Pacokonstruantoj (UNOY); ĝi estas organizo, kiu laboras pri konflikttransformado, ekzemple en regionoj kun perfortaj konfliktoj kaj postmilitaj situacioj. Unu el miaj ĉefaj profitoj estas plibonigi mian anglan, dum la ĉefa avantaĝo estas la spaco, kiun TEJO havas por esprimi opinion, lobiumi kaj kampanjadi. Eĉ se ni ne havas la saman impakton kiel la Eŭropaj Liberaloj, Erasmus Studenta Reto aŭ la Naturamikoj, ni estas akceptataj kaj esperantistoj estas pli kaj pli videbligitaj en internaciaj diskursoj.

Kiel direktoro de ĝi, kiel vi priskribas la efikon de la studsesio “Junularaj perspektivoj” okazinta en la Eŭropa junulara centro de Budapeŝto?

Tiu studsesio estis organizita de TEJO kaj la junulara departemento de la Konsilio de Eŭropo en novembro 2023, kaj ni pritaksis profundan efikon al la kapabloj de la partoprenantoj. Dum la kvin tagoj de la evento ni esploris interkulturajn dialogojn kaj neperfortan komunikadon. La pretigado de la evento, kiu inkluzivis simltanan interpretadon en Esperanto kaj la angla, helpis al mi plibonigi miajn lingvokapablojn en la angla, kio estis antaŭe nekutimaĵo. En la teamo ni havis kvar trejnistojn de TEJO, kun unu ekstera spertulo pri interkulturaj dialogoj, kaj la subteno de la Eŭropa Junulara Centro, kiu zorgis pri loĝado kaj manĝado, estis tre valorplena. La etoso inter TEJOanoj kaj aliaj eŭropaj junuloj estis pozitiva, kio favoris la interŝanĝon de ideoj kaj praktikoj. Ni ankaŭ organizis distrajn programerojn, kiuj helpis plifortigi la komunumon kaj la rilatojn inter partoprenantoj. Dum la eventoj la uzo de lingvoj estis diversigita: unu trejnisto prezentis en Esperanto, aliaj uzis la anglan kaj kelkaj faris miksaĵojn. La dulingva medio ne nur faciligis la komunikadon, sed ankaŭ instigis al la partoprenantoj plibonigi siajn kapablojn en ambaŭ lingvoj. Ni observis, ke la angla ofte estis pli uzata en miksitaj grupoj, kvankam la esperantistoj estis iom pli en nombro. Unu el la gravaj aspektoj de la evento estis la kunlaboro inter trejnistoj por antaŭenigi la kapablojn de TEJOanoj kaj junuloj ekster TEJO, per neformalaj edukaj metodologioj. Eĉ se la ĉefa celo ne estis rekte membrigi novajn partoprenantojn, pluraj el ili fariĝis membroj de TEJO, kio montras la valoron de tiaj okazaĵoj. La esenca rezulto estis kapabligi homojn per Esperanto en temoj, kiuj interesas ilin, kio pliigas iliajn profesiajn eblecojn. La sukceso de la studsesio montras la gravecon de tiaj iniciatoj en nia

movado, kaj mi antaŭvidas pliajn ŝancojn por plibonigi dulingvan komunikadon en estontaj eventoj.

Kiel vi vidas la rolon de Esperanto en la politika kaj socia kunteksto de Eŭropo, precipe post via partopreno en eventoj kiel LevelUp! en la Eŭropa Parlamentejo?

LevelUp! estis evento organizita interalie de Forumo Junulara Eŭropa, la tegmenta organizo de internaciaj organizoj kaj naciaj junularaj konsilioj en Eŭropo. Ĝi okazis en aprilo 2024 en Bruselo, en la instituciaj konstruaĵoj de la Eŭropa Unio, kaj daŭris du tagojn, kunigante ĉirkaŭ 1200 junulojn el diversaj landoj. Mi havis la plezuron esti la delegaciestro de TEJO, kiu kontribuis kun ses aliaj partoprenantoj. La ĉefa celo de la evento estis promocii la pasintjuniataj eŭropaj balotoj, sed partoprenantoj ankaŭ povis elekti el diversaj ateleroj kaj agadoj laŭ siaj intereso. Kvankam la evento havis politikan fokuson, ĝi ne estis partia, kaj tiel kreigis bona oportuno por interagi kun aliaj junularaj organizoj kaj fortigi eksterajn rilatojn. Ni havis la ŝancon amikumi kun reprezentantoj de junularaj politikaj partioj, kaj tiamaniere Esperanto aperis en politika kunteksto. Ekzemple, la vicprezidanto de la junularo de la Eŭropaj Socialdemokratoj rimarkis, ke socialismo varias laŭ landoj kaj tradicioj, kaj pro tio oni devus adapti la uzadon de Esperanto al specifaj landaj cirkonstancoj. Aliflanke, la Eŭropa Pirata Partio ne konsideras lingvajn rajtojn prioritatajn, ĉar ilia fokuso estas sur datuminterŝanĝo kaj aŭtorrajto. Ĉi tiuj interagoj montras, ke Esperanto estas utila kiel neŭtrala komuna lingvo, sed ĝis nun ne ekzistas konkreta propono el politikaj partioj por ĝia plia integriĝo en politikajn diskutojn. Tamen, mi bedaŭras ke rilati kun homoj ekster Eŭropo

”

Ĉi tiuj iniciatoj helpas plibonigi la kapablojn de niaj membroj, igante ilin pli aktivaj kaj kompetentaj; tio povas profiti iliajn karierojn kaj personajn vivojn, eĉ se ili ne rekte rilatas al Esperanto.

”

La sukceso de la studsesio montras la gravecon de tiaj iniciatoj en nia movado, kaj mi antaŭvidas pliajn ŝancojn por plibonigi dulingvan komunikadon en estontaj eventoj

”

Eĉ se ni ne havas la saman impakton kiel la Eŭropaj Liberaloj, Erasmus Studenta Reto aŭ la Naturamikoj, ni estas akceptataj kaj esperantistoj estas pli kaj pli videbligataj en internaciaj diskursoj

estas pli defia, precipe pro la manko de similaj politikaj infrastrukturoj kaj financaj ebloj en aliaj mondopartoj, kompare kun la subvencioj de la Eŭropa Unio. Ĉi tiu defio igas min pensi pri kiel eŭropaj modeloj povus inspiri internacian kunlaboradon.

Por fini per pli malserioza temo, kio estis la plej memorinda sperto, kiun vi havis dum Esperanto Senlime, precipe rilate al la defioj kaj la vojaĝado?

Mi ekakceptis, ke la akurateco de trajnoj en Hispanio estas katastrofega (rido), kaj mi ankaŭ lernis pri aliaj aferoj, kiel petveturado. Tamen, plej grave, mi ĝuis la sperton konkuri dum dek tagoj kun dek sep junaj esperantistoj, trapasante kvar eŭropajn landojn kaj plenumante la plej frenezajn, stultajn kaj amuzajn defiojn. Antaŭe mi neniam petveturis, kaj por unu el la defioj oni devis tion fari el Liono ĝis Diĵono. Mia teamo, nomata “La Bierknaboj”, konsistis el tri viroj kun grandaj dorsosakoj, unu el kiuj estis tre alta, kio ne faciligis la akcepton en senpaga aŭto. Sen ajna scio pri la franca, unu el ni sukcesis haltigi aŭton ĉe benzinejo kiu akceptis lin, kaj la aliaj du vojaĝis en kamiono. Kvankam estis spaco por ni, poste la polico haltigis nin kaj faris pezkontrolon. La kamiono superis la permesitan maksimumon je sesdek kilogramoj, kaj la ŝoforo devis pagi punon por daŭrigi, sed rifuzis akcepti, ke ni repagu ilin. Kortuŝe, mi memoras kiel miaj kunteamanoj lernis spontane kaj scivoleme iom da kataluna, kaj, je nia alveno en Barcelonon, ili povis aĉeti fajrilon kaj eĉ laŭte ripeti hazardajn frazojn (rido). Esperanto Senlime estas realecotelevida elsendo de TEJO, kaj ĝi estas spektebla en Jutubo! ■

ĈU UKRAINIO EKPAROLAS PLI OFTE EN LA UKRAINA?

Saim Dušan Inayatullah

membro de la Grupo de Lingvistoj por la Diverseco

Tradukis Hektor Alos i Font¹

Onidire en Ukrainio okazas konsiderinda ŝanĝo en la soci-lingvistika kaj identeca pejzaĝoj kiel rezulto de la rusia invado lanĉita la 24an de februaro 2022. La brita ĵurnalo *The Guardian* deklaras, ke okazis “generacia ŝanĝo”,² kaj asertas, ke ĉirkaŭ triono de la loĝantaro de la ĉefurbo, Kijivo, “adoptis” la ukrainan lingvon ekde la komenco de la milito. Same, *Le Monde* diras, ke miloj da ukrainoj “forlasis” la rusan.³ Kaj se ni serĉas la ukrainan esprimon “перейти на українську” (“transiri al la ukraina”), ni rapide trovas dekojn da videaĵoj kaj poŝtaĵoj de homoj asertantaj, ke ili ĉesis paroli la rusan, aŭ konsilas, kiel fari tion.

Sed kiu proporcio de la loĝantaro estas ukrainlingva? Laŭ la lasta

popolnombrado, en 2001, proksimume 67,5% de la loĝantaro deklaris la ukrainan kiel sian denaskan lingvon, dum denaskaj ruslingvanoj konsistigis 29,5% de la loĝantaro. Tamen, la plej multaj enketoj faritaj antaŭ 2014 indikis, ke la ukraina estis la lingvo hejme uzata de sufiĉe pli malalta proporcio, inter 50% kaj 55% de la loĝantaro, kaj malpli ol duono de la ukrainianoj uzis la ukrainan en la laboro aŭ en publikaj lokoj. La nombron de homoj, kiuj deklaris sin denaskaj ukrainlingvanoj, kvankam ili havis la rusan kiel unuan aŭ kutiman lingvon, klarigas la kutimo en postsovetiaj landoj asocii la terminon “denaska lingvo” kun la lingvo de etna identigo kaj ne kun la unue lernita lingvo. Malfacilas determini la uzadon de la lingvoj el kvantaj datumoj,⁴ ĉar la deklaroj de la parolantoj ofte respondas pli al la celita uzo de ĉiu lingvo ol al ilia efektiva uzo.

La flankenpuŝado de la ukraina havas longan historion: en la 19a kaj frua 20a jarcentoj la ukraina estis la lingvo de la kamparanoj, dum la urboj parolis la rusan (aŭ la polan aŭ la

hungaran en kelkaj okcidentaj regionoj de la lando). Krome, la dua plej parolata lingvo en la plimulto de la urboj estis ne la ukraina, sed la jida. Post la bolŝevisma revolucio Sovetio donis oficialan statuson al la ukraina, fenomeno akompanita de procezo de urbiĝo kaŭzinta, ke multaj ukrainlingvaj kamparanoj ekloĝis en la urboj. Pendolado inter politikoj de rusigo kaj relativa toleremo karakterizis la ceteron de la sovetia periodo, kiu iom post iom fortigis la pozicion de la rusa sen tio, ke ĝi forglutis la ukrainan.

Post la malfondo de Sovet-Unio aperis du malsamaj identecaj diskursoj (se ni flankenlasas la malplimulton, kiu sentis sin precipe rusa kaj ne partoprenis en la kreado de la ukraina identeco). Ukrainaj naciistoj konsideris la ĉeeston de la rusa en Ukrainio historia aberacio, rezulto de rusa imperiismo, kaj volis igi sendependan Ukrainion “normala” naciŝtato, kie la oficiala lingvo superregu en ĉiuj regionoj kaj en ĉiuj vivosferoj. Alia grupo esprimis sin ĉefe aŭ parte en la rusa kaj sentis sin ligita al la cetera postsovetia spaco. La naciisma dupolusigo provokita de la rusia invado de 2022 ŝajnas esti kaŭzinta konsider-

1 Originalo aperinta en Vilaweb, la 26an de julio 2024, <https://www.vilaweb.cat/noticies/ucraina-parlar-mes-ucraines-opinio-glidi/>

2 <https://www.theguardian.com/world/2023/mar/06/russia-ukrainians-embrace-language-war>

3 https://www.lemonde.fr/international/article/2024/02/20/le-passage-a-la-langue-ukrainienne-un-acte-de-resistance-quand-j-entends-parler-russe-ca-me-donne-envie-de-voir_6217446_3210.html

4 Vidu <https://www.vilaweb.cat/noticies/mesurar-salut-llengua-opinio-glidi/>

indan reduktiĝon de la dua ideologia tendaro, kaj multaj “dukulturaj” ukrainoj turnis la dorson al Moskvo kaj ekalprenis la starpunktojn de la ukraina naciisma tendaro.

Por iom eltiriĝi el tiu duflankeco, dirindas, ke la ukraina ne estas la sola teritoria lingvo de Ukrainio, sed ke krom la pola, la jida kaj la hungara, kiujn ni jam menciis, ekzistas ankaŭ la rumana, la karpata rutena, la krime-tatara, la ponta greka kaj la bulgara. Preskaŭ ĉiuj ĉi lingvoj estas sub grava minaco de la rusa, krom la hungara, kiu bone fartas, la pola, kiu estis plejparte forglutita de la ukraina, kaj la karpata rutena, kiu ankaŭ cedas antaŭ la ukraina.

Se reveni al la lingva konflikto inter la du plejmulte parolataj lingvoj en Ukrainio, jen la atesto de Irena Dahl, ukrainino el Mykolaiv, ĉefe ruslingva urbo en suda Ukrainio, kiu taŭgas kiel ekzemplo de ĉi tiu ŝanĝiĝo:

Mi naskiĝis en Ukrainio de ruslingvaj gepatroj. Ni havis la ukrainan kiellern-ejan studobjekton kaj aŭdis ĝin en la televido, sed preskaŭ neniu parolis ĝin ekster la klasĉambro. [...] Mi konsideris, ke la ukraina estas lingvo parolata nur en la vilaĝoj fare de ne tre instruitaj homoj. La 24an de februaro [2022] estas la tago, kiam mi ĉesis esti rusa. [...] Mi flue ekparolis la ukrainan en aprilo. [...] Mi ankoraŭ estas ruslingva ukraino, sed mi parolas la ukrainan kun denaskaj ukrainaj parolantoj kaj en publikaj lokoj. [...] Iom postiom, la rusamalaperasel Ukrainio, kaj kiel ruslingvano mi subtenas tion.

Ankaŭ socilingvistika analizo de la ukraina politika sciencisto Volodymyr Kulik⁵ – kiu komparas la rezultojn de du enketoj faritaj en 2014 kaj 2017 kun tiuj de alia okazigita kelkajn monatojn post la komenco de la milito kun Rusio – ŝajnas indiki konsiderindajn ŝanĝojn favore al la ukraina.

Laŭ Kulik, 49% de la enketitoj en 2017 asertis, ke ili parolas ĉefe aŭ ekskluzive ukraine en la ĉiutaga vivo, nombro kiu altiĝis al 58% antaŭ la fino de 2022.

Krom la deklarita lingvouzo, la enketo ekzamenis ankaŭ kiom da intervjuitoj elektis paroli ukraine kun intervjuanto, kiu alterne uzis la du lingvojn: nur 45% elektis paroli la ukrainan en 2014, dum 87% faris tion en 2022. En la sudo kaj la oriento de la lando – plejparte ruslingvaj regionoj – evidentiĝis eĉ pli granda ŝanĝiĝo: nur 10% de la loĝantaro respondis la enketon ukraine en 2014, kompare kun 74% pasintjare.

Kulik agnoskas, ke tio ne nepre pruvigas ŝanĝon en la ĉiutagaj lingvouzoj de la loĝantaro, sed argumentas, ke ĝi ja indikas plialtiĝon de la prestiĝo de la oficiala lingvo:

Ĉi tio, kompreneble, ne signifas, ke de nun 87%, aŭ eĉ 74%, de niaj samcivitanoj parolos ĉefe en la ukraina, kaj estas klare, ke la lingvo ne subite regos en la sudo kaj la oriento [de la lando]. Tamen en pli-malpli formalaj situacioj [...] tre larĝa plimulto de la loĝantaro jam komprenas la bezonon paroli ukraine. Per si mem, tio jam estas la plej granda kaj grava ŝanĝo en la lingva situacio, ŝanĝo kiun, mi supozas, ĉefe kaŭzis ĝi [la rusia invado de 2022]. Nun ni havas [...] la fundamentojn por disvolvi tiun sukceson kaj igi la ukrainan la socie norma lingvo [...] de la publika vivosfero. En la privata vivo la civitanoj daŭre interkomunikos tiel, kiel por ili plej facilas aŭ komfortas, sed la kutimoj kaj lingvouzoj akiritaj en la publika sfero fine transiros al la privata vivo.

La prognozo de Kulik estas optimisma, sed ne malebla. Restas vidi, ĉu tiu tendenco de kreskanta identiĝo kun la ukraina daŭros, kaj ĉu ĝi rezultigos novajn lingvouzojn. Tio dependas de eksterlingvaj faktoroj, kiuj estas tre malfacile antaŭvideblaj, ekzemple la preciza evoluo de la milito, la novaj limoj aŭ armistic-linioj, kiuj estos establataj, se la konflikto frostiĝas, kaj la nombro kaj loko de fina setlado de la internaj delokitoj, plejparte ruslingvanoj. Kvankam ni vidas certajn signojn de plifortiĝo de la ukraina lingvo, la historio ankoraŭ devas diri, kia estos ĝia fina sorto. ■

”

Post la naciisma dupolusiĝo provokita de la rusia invado de 2022 ŝajne multaj “dukulturaj” ukrainoj turnis la dorson al Moskvo kaj ekalprenis la starpunktojn de la ukraina naciisma tendaro

”

En pli-malpli formalaj situacioj [...] tre larĝa plimulto de la loĝantaro jam komprenas la bezonon paroli ukraine.

5 <https://zbruc.eu/node/114247>

BELETRO DE JUNULOJ

Carlo Minnaja

Akademiano, matematikisto, eseisto kaj historiisto



Malfacilas trovi beletristojn en la junulara e-movado, ĉar plejofte esperanton oni renkontas ekde la post-bazlerneja aĝo. Ja veras, ke kiam alvenas adoleskiĝo, ĝuste tiam soras poeziaj inspiroj, sed eĉ partoprenintoj en infankongresetoj kaj TEJO-kunvenoj malfacile sentas sin tiom lingve spertaj, ke ili kapablas produkti beletraĵojn kaj sukcesas ĝin publikigi ie. Ja ĉi-jarcente blogoj helpas en la rapida diskonigo, sed ankaŭ antaŭe ne mankis beletristoj kiuj riveliĝis

tre junaj. Sed nun ankaŭ la koncepto pri juneco dilatiĝis: almenaŭ en sud-okcidenta Eŭropo ĉiam pli multe da geknaboj restas ĉe la gepatroj kaj ne starigas propran hejmon kaj familion ĝis post tridek jaroj. Ĉi-paĝe ni provos konsideri kelkajn, kiuj debutis literature antaŭ la dudekkvin-jariĝo, kiu iam estis la aĝolimo de TEJO.

Se preterpasi la jam ege abunde (eĉ ĝisnaŭze) trivitan ekzemplon de *Malamikete* akuŝitan de Zamenhof en 1878 dek tagojn antaŭ sia 19-jariĝo,

impresas la ĝeneva Edmond Privat (1889-1962), kiu nur dudekjara jam prezentiĝas kiel literatura kritikisto per tri paroladoj: *La vivanta lingvo de vivanta popolo* (UK en Barcelono, 1909), *La vivo de Esperanto* (en Aŭgsburgo, 1910) kaj *Pri Esperanta literaturo* (UK en Antverpeno 1911), ĉiuj presitaj en 1911-1912. *Tra l' silento* (1912), fakte lia sola poemkolekto el nur dek eroj, ĉarmas la leganton per malfruromantika melodio, kun kvarversaj strofoj kun inaj alternaj rimoj. La temo estas la kutima de tiu-

aĝuloj, tenera amo, kiu poste velkos kaj vaniĝos (edziĝo en 1911, divorco en 1925).

Al klasikeco li turniĝas per la versa dramo *Ginevra*, verkita en 1910 kaj premiere ludita en la Varietea Teatro dum la UK en Berno (1913), kaj ripetita en Ĝenevo (1925, sub reĝisorado de Baghy). Protagonistas la reĝino, edzino de reĝo Arturo; ŝin logas la amo de Lanceloto, kavaliro de la Ronda Tablo laŭ la sagao rakontita de Chrétien de Troyes kaj reprenita plurloke, ekzemple en la kvina kanto de la *Infero* de Dante Alighieri, sed la interpreto far Privat prezentas virinon ĉastan, kiu volas helpi al siaj regnanoj kaj rifuzas malfideli al sia edzo, malgraŭ la ama pasio; cetera ankaŭ la sagao finiĝas per la morto en batalo de Arturo, kaj lasta kiso inter Ginevra kaj Lanceloto ĉe lia tombo. Privat montras grandan admiron al la virinoj, restante ĉiam respekta al sia unua edzino, Angèle Fallot (1888-1943), kiu poste fariĝos vivkunulino de Salo Kornfeld (1896-1943), poldevena judo mortonta en alsaca koncentrejo, kaj plene akordiĝante dum la tuta restanta vivo kun la dua, Yvonne Bouvier (1891-1977), konita en la gimnazia medio de la revuo *Juna Esperantisto*. Ankaŭ grandan talenton Privat montras en la unua eksperimento pri “poezia prozo”, la ĉarma rakonto *Tamen perdota* (1912).¹

Lernejkunulo de Privat estis Hector Hodler (1887-1920), kunfondinto de UEA kaj redaktoro de revuo *Esperanto* (ambaŭ subjektoj plenprospere vivantaj ĝis nun) kaj premiita pro kortuŝa rakonto *Kristnaska nokto* (1907). Bedaŭrinde Hodler ne havis la eblon esti adolto kiu retrorigardas siajn junulajn beletrajn verkojn; filo de fama svisa pentristo, sian nemalgravan havaĵon li destinis legace al UEA je sia morto je 33 jaroj.

Preskaŭ samgeneracie floras en Pollando duopo da talentaj junuloj:

1 Fragmentoj el Pri Esperanta literaturo kaj Tamen perdota troviĝas en Historio de la Esperanta Literaturo (HEL), paĝoj 680-684.

Wiktor Elski (1893-1956), pseŭdonimo de Stanisław Zygmunt Braun, kaj Eska, akronimo de Stanisław Karolczyk (1890-1966), kiuj publikigas en 1910 komunan poemaron *Unuaj agordoj*. Kiel videblas el la biografiaj datoj, ili estas apenaŭ iom pli ol knaboj; ambaŭ orbitas ĉirkaŭ Lodzo, la plej juda pola urbo post Varsovio. Elski partoprenas en liberiga movado kontraŭ la cara dominado, do li plurfoje ŝanĝas rezidejon por eskapi de persekutoj; longe li restas en Varsovio kaj revenas al Lodzo nur post la dua militego. Liaj mallongaj versoj trempiĝas en melankolio; el la *Esperanta Antologio* ni legas la jenon:

*Kial ho kantojn malgajajn mi kreas,
kial gajeco ne venas al mi,
kial en nigra la tomb' mi pereas
anstataŭ vivi kun kred' al geni'?*
*Kial, ho kial? Demandas mi vane,
saman revokon mi aŭdas en kor'.*
Malĝoj' por ĉiam kun mi akompane
Ĝis mort' irados, ĝis lasta la hor'.²

Dek jarojn poste, do ankoraŭ nur 27-jara, travivinte la unuan militegon, li estas penetrata de duboj pri la signifo mem de esperantismo:

*Ĉu sole iaj historifosistoj
prezentos al la taga lum' rakonton
pri ni, pasintaj jam esperantistoj,
kiuj pupilojn fiksas en Estonton,
kiuj kredis, ke per laborad' ilia
formiĝos unu rondo familia?*

...
*Ĉu ĝerm' ni estas en plugita fendo
aŭ nur fabel' mirinda, nur legendo?³*

Preskaŭ ĝemelas al Elski lia kunulo Eska:

*Nun persekutas min malbonsorto,
kaj ĝi jam restos kun mi ĝis morto
en ĉiu spir'.*

Kaj kiam li pensas pri pasintaj travivaĵoj:
Nur unu gast' – feliĉo / ĝis nun min ne vizitis.⁴

2 La tuto, sub titolo Kial mi kantas, estas kvinstrofa.

3 HEL, p. 68.

4 Ambaŭ fragmentoj en HEL, p. 69, ĉerpitaj el la Esperanta Antologio.

Ankoraŭ pola studento, Cezław Kozłowski (1894-1956), junaĝe aktiva en Kievo, esprimas la mornon oftan ĉe 18-jaruloj en sia poemaro *Petaloj* (1912); li kabeos post 1914, memorpeco pri li far Miĥalski en *Sennacieca Revuo* de 1924 lin nomas “poeto de l' kosma melankolio”.

Se ni venu al pli modernaj tempoj, italo Giorgio Silfer (1949) debutis 17-jara en 1967 per novelo *Gabriela*, dua premio en konkurso okaze de Eŭropa Kongreso en Montecatini (Italio, 1968); tuj sekvis kolekto da anekdotoj (1972) kaj dramo *Doktoro Rosales* (1973); lingvo-instruisto, doktoro pri modernaj lingvoj kaj beletristiko, kunfondis en 1969 la literaturan rondon “La Patrolo”; ties organon, *Literatura Foiro*, konstante aperantan ekde junio 1970, li redaktis de la unua ĝis la sesdeka numeroj. Pluraj aliaj verkoj sekvis, jam ne plu junulaj, inter kiuj *HEL (Historio de la Esperanta Literaturo)*, 2015 kun C. Minnaja.

Hispano Jorge Camacho Córdón (1966), spertulo pri araba kulturo, interpretisto, universitata profesoro, nun bibliotekisto, estis dudekkvinjara ĉe la aperigo de novelaro *Sur la linio* (1991), kie naŭ rakontoj kun malsamaj intrigoj estas organizitaj, tiel ke oni devas ilin legi kiel labirinton. Sekvos aliaj gravaj verkoj, kiel la 390-versa poemato *Monologo kun Mediteraneo* (1993), kie li eksplodas per la defendo de la socia justeco, la kondamno de la bestaj masakroj, la abomeno pri la perforto al virinoj funkcia kiel kruela etna rasismo. Kun la aliaj tri iberoj, sed ja malpli junaj, Miguel Fernández Martín (1950), Miguel Gutierrez Adúriz (1950) kaj Gonçalo Neves (1964) aperos *Ibere libere* (1993), poemaro, kiu rolos kiel mejloŝtona dividpunkto inter malsamaj literaturaj periodoj en HEL. Li plu poetas, esas, recenzas, redaktas.

Inter la pluaj, kiuj premiere alfenestriĝis al beletraverkadokiamjunaj, povas menciigi la apuliano Nicola Ruggiero (1986), bakalaŭriĝinto en Islando pri islanda kaj angla lingvoj kaj literaturoj, magistriĝanto en Italio pri lingvistiko, nun bazlernēja instruisto, kiu debutis per *Taglibro de nenifaranto* (2008): kvardek ok poemoj rakontantaj amon de dekokjarulo, intensan sed fatale mallongdaŭran, por hungara knabino, kaj seniluziigon: *tempo ŝanĝiĝas, kaj mi kun ĝi*. Versoj kiuj eĥas la klasikan lirikon, kun heksametroj kaj alkaja strofo, kun resonado de la Vergiliaj eklogoj. Post malgranda italilingva kolekto, jen venas la pli ampleksa *La kanto de l' korvo* (2014), verkita sub malsama influo: sesdek poemoj en situacio sentimente pli serena; la aŭtoro dumtempe setlis en Islando, kie li magistriĝos, apud al Baldur Ragnarsson kaj pilgrimos al Skotlando spure al memoraĵoj de Auld. La influo al lia verkado estas rimarkinda: la mediteranea helen-latina klasikeco ne malaperas, sed mildiĝas por lasi spacon al aliaj inspirfontoj. Sekvos dum la jaroj eseoj, redaktado de revuo, monologo kaj rakonto premiitaj en la BK en 2015, do la junaĝa spurto ne estas perfdita.

Ne pretervivis plenan maturiĝon brazilano Paulo Silas (1990-2017), administra teknika asistanto, kiu produktis kaj memeldonis kvar poemarojn: *Indiferento: de la Universo ĝis la Homo* (2014), *Sinmortigo* (2015), *Brazilano laŭleĝe*. *Esperantisto laŭkonvinke* (2015), *Transgeneraciaj kulpoj* (2017). Ĉiuj liaj poeziaĵoj, senpage deŝuteblaj el lia paĝaro Paulo Silas (esperanto.net), estas trempitaj per seniluziigo, soleco, pesimismo; bedaŭrinde la blogo ne pluas, ĉar tion, kion li anoncis en la poemaro *Sinmortigo*, li fakte plenumis en oktobro 2017. Tion antaŭaludas la poemo *Spleno*:

*Ĉi-nokte, la stratolampoj ne scintilos lumaj.
Fenestroj ne malfermiĝos al radioj lunaj.
Elspiros lastfoje malsanuloj en la litoj.
Timemaj okuloj kaŝrigardos kontraŭ vitroj.
La katoj promenos kiel ombroj malamikaj.
Profunda silent' estiĝos post la bruoj riglaj.
La plando, sur la pavim', afablos per la lano.
La vivo kaj forpaso reprezentos samon.
Hamakoj ne balanciĝos en tagmeza morno.
Kaj malrapide, malvarme, morte pulsos koro.*

Noveloj, poemoj, eseoj, estas, se tiel diri, facile produktetbla varo. Ne ja tiel kvazaŭa romano, tial estas vere rimarkinda la longa novelo aŭtobiografia, *Londonanidoj*, verkita de dekkvarjar-

ulo: brito Donald N. Mumms. Temas pri la trudita elloĝigo el Londono de granda parto de lernejoj en aŭgusto 1939, por ilin protekti kontraŭ la sekvoj de eventuala bombado, ja la milito estis jam komenciĝinta. La geknabetoj estis transportitaj foren kun siaj gepatroj kaj geinstruistoj. Aŭtobuso, trajno, metropoliteno, piedirado kondukis la amason al fora urbeto, mankis akvo, higieno, ebleco ripozi: la distribuado de proviantoj, cetero malmultaj, daŭris horojn. Ĉiuj estos distribuitaj en hejmoj de kamparaj familioj kaj kunloĝado en malvasta spaco kreis kelke da malfacilaĵoj. La vivo en la kamparo, ĉirkaŭate de farma brutaro, estis tre peza, necesis nutri la brutojn; necesis iri al diservo laŭ dimanĉa kamparana konduto, kiu ne permesis ridi, kuri, ludi; krome oni devis mallumigi la lampojn, por obskurigi la pafcelojn al eventualaj malamikaj avioj. En letero legiĝas: *malriĉeco en la kamparo estas pli terura kaj anim-mortiĝa ol en la urboj*. Nepros reorganizi la lernadon, la lecionojn, la vivon entute; necesos bankostumoj por eniri la akvon.

Kompreneble okazis malobeoj al strangaj ordonoj, kun la sekva vergado far la instruistinoj, kio ŝajnis tiam tute kutima edukistemo; dolora malagrablo sidi daŭris dum plena tago aŭ eĉ pli kaj aspektis normala situacio.

Krom la lecionoj estis organizataj sportaj eventoj, konkurso pri kurado, ekskurso al ŝtonminejo; pasie partoprenataj estis futbalmatĉoj, kaj belas la kreado de sportaj terminoj kaj la prirakontado de partioj. Ankaŭ pri ludado, la reguloj ne estis samaj, kaj tio kaŭzis kelkajn konfliktetojn. Alia matĉo pri terkonkero estis organizita kun alivilaĝa teamo. Entute la rakontado fluas nature en ĉi tiu nenatura situacio, kie ankaŭ

la monrimedoj estis malegalaj distribuitaj. Estas deciditaj komitatoj, batalteamoj, ĵurado pri fideleco. Simulita geedziĝo donis vivecon al la stranga situacio; ja ambaŭseksaj lernejoj kuniĝas ne haltigate de rigoraj kutimoj.

La rakonto fermiĝas je paĝo 100, post fino de interteama batalo (venkis la londonanidoj kontraŭ la kampuloj).

Pri la aŭtoro, la eldonejo, The Esperanto Publishing Company en 1946, diras la nomon, la aĝon (14 jaroj) kiam li verkis la rakonton, la fakton, ke li estis studinta la lingvon hejme dum 15 monatoj kaj ke li mortis en marto 1945, nur dekkvinjara. La libro estas "Dediĉita al la geknaboj de Londono, el kiuj estas la verkinto". La malnova ekzemplero el kiu fontas la fotokopio trovebla rete havas la stampon de la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

Nur kelkajn liniojn mi fine dediĉu al Petr Ginz (1928-1944), juda junulo, kreskinta en ĉeĥa-juda esperanto-familio (ambaŭ gepatroj parolis inter si esperanton), kiu ja verkis nur ĉeĥe, sed de li restas manskribitaj folioj kun vortareto esperanta-ĉeĥa, kiujn li laŭmemore skribis. Li vivis en la porjuda koncentrejo Terezín dum du jaroj; la 28an de septembro 1944 trajno lin transportis al Auŝvico, al gaskamero. La pli juna fratinino Chava Pressburger (1930-2022), same deportita al Terezín, saviĝis, kaj al ŝi ŝuldiĝas la eldonado de la verkoj de Petr. La esperanta versio, eldonita ĉe KAVA-PECH en 2005, estas la unua traduko inter la multaj alilingvaj kaj la nura havanta la menciitan vortareton.

Omaĝon kaj honoron al niaj junaĝaj beletraj verkistoj! ■

LA ETA TALPO EN ESPERANTO

Xavier Alcalde
Politologo



Ĝuste pasintaŭguste, speciala homo, Carles Ferrer Sala, ricevis specialan ekzempleron de la lasta traduko de la fabelo: Pri la eta talpo, kiu volis scii kiu faris tion sur lian kapon.

La eta talpo fariĝis 35-jara. La fabelo *pri la eta talpo, kiu volis scii...* estis unue publikigita germane en la somero de 1989. Laŭ la aŭtoro, Werner Holzwarth, la libro ekvendiĝis la 15an de aŭgusto, ĉefa ferio en multaj landoj. Ĝuste pasintaŭguste, speciala homo, Carles Ferrer Sala, ricevis specialan ekzempleron de la lasta traduko de la fabelo: *Pri la eta talpo, kiu volis scii kiu faris tion sur lian kapon*. Temas pri

fama porinfana rakonto, en kiu la ĉefrolanto (t.e. la eta talpo) faras amuzan detektivan vojaĝon por malkovri la respondeculon de tiu faro.

Laŭ Carles Ferrer, la vivo estas mirinda donaco; tamen, de tempo al tempo oni ĵetas al ni 'malagrablajn surprizojn', kiujn oni devas pritrakti, kiel okazas ĉe la talpeto. Li kolektas la historion de la talpeto en diversaj lingvoj, kaj kreis Asocion de la

Amikoj de la Eta Talpo. Ofte li mem estas la instiganto de traduko, kaj de pluraj jaroj li amikiĝas kun Werner Holzwarth, kiu jam vizitis Barcelonon. Ofte en sia blogo Carles komparas la diversajn tradukojn (vidu <https://amicsdelatalpeta.wordpress.com/>).

La Esperanta eldono aperis fine de 2023. Temas pri la lasta traduko aperinta ĝis nun. Jam estas 49 eldonoj

de la rakonto: afrikansa, brita angla, usona angla, araba, bretona, ĉeĥa, ĉina, dana, esperanta, estona, eŭska, feroa, finna, franca, frisa, galega, germana, greka, hebrea, kastilia hispana, argentina hispana, meksika hispana, hungara, islanda, itala, japana, kartvela, kataluna, kimra, korea, kurda, latva, luksemburga, nederlanda, norvega, okcitana, pola, portugala el Portugalio, brazila portugala, rusa, serbokroata, skota, slovaka, slovena, sveda, turka, vjetnama kaj zazaki.

En 2019, la eta talpo aĝis 30 jarojn, ronda cifero. Tiutempe Carles havis la rakonton en 29 malsamaj lingvoj kaj ekpensis fari ekspozicion de ĉiuj, kaj iel klarigi la neordinaraĵojn de la malsamaj tradukoj. Kiu lingvo estus la trideka? Ideale, li pensis, devus esti Esperanto. Sed aperigi la esperantan eldonon havis iom pli longan historion.

Lia unua esperanta kontakto estis nia samideano Martí Guerrero, kiu dum jardekoj dediĉis sin al la instruado kaj propagando de Esperanto. La ideo de Carles estis kompletigi tradukon de la teksto, fari muntadon kun la ilustraĵoj kaj amato 'eldoni' tri aŭ kvar ekzemplerojn, kaj por la kolekto de eta talpoj, kaj por la tradukinto, kaj por Werner Holzwarth okaze de la 30a datreveno de la rakonto. Tamen, naskiĝinta en 1932, Martí preferis rifuzi la proponon. Iu pli juna entreprenu tiun taskon.

Kiel dua klopodo, Carles petis konsilon al pli juna lernanto de Esperanto, Albert Marzá. Albert estas, kaj amiko de la Eta Talpo, kaj amiko de Martí, kaj amiko mia. Tiel Albert kontaktigis Carles kun mi. Sed ankaŭ mi ne jesis al propono pri tradukado. Simile al Martí, mi opinias grava tradukadon ĝenerale, kaj aparte tradukadon al Esperanto. Ne ĉiuj povas tion fari samnivele. Estus multe pli bone se profesia tradukisto entreprenus tion. Mi proponis min kiel peranton de la afero.

Fakte, mi konas plurajn esperantistojn, kiuj tradukas profesie. Inter ili, mi elektis István Ertl. Ne nur pro tio ke li estas elstara tradukisto, kapabla esperantigi tekstojn el dekoj da lingvoj. Mi ankaŭ sciis, ke lastatempe la kataluna fariĝis unu el liaj familiaj lingvoj. Krome, mi havis plurjaran sperton de kunlaborado kun li. Interalie, pasintec li akceptis similajn proponojn miajn pri tradukado en Esperanton, ekz. la antaŭparolo de *Antaŭ unu jarcento* (kunredaktita libro pri la unua mondmilito), kiu verkis en la angla la usona historiistino Brigid O'Keeffe.

István petis pli da informoj antaŭ preni decidon. Ĉu temas pri longa libro? Tute ne. En ordo. Li duonakceptis, kondiĉe ke mi daŭre rolus kiel peranton, kaj ke mi trovu seriozan eldoniston. Ĉu ekzistas seriozaj eldonejoj kiuj akceptus eldoni infanlibrojn en Esperanto? Denove la respondo estas jes, kaj fakte pluraj. Inter ili,

mi elektis la slovakon Esperon. Kaj mi tuj kontaktis ĝian respondeculon Petro Baláž. Petro duonakceptis, kondiĉe ke mi daŭre rolus kiel peranton.

Mi kontaktigis Carles kun István kaj Petro. Carles kontentis. István tuj faris la tradukon, efike kaj altkvalite. Sed la esperanta eldonado devis atendi... plurajn jarojn. Interalie, pro la pandemio. La sekva paŝo estis kontaktigi Peter kun Mundt, la rajtagentejo de Werner Holzwarth. Tiu agentejo celis kontroli ĉiun detalon de la eldonado, por ke ĝi estu ekzakte kiel la aliaj. Carles peris tiun rilaton. Oni parolis ankaŭ pri monaj aferoj kaj oni atingis interkonsenton: la eldonejo Espero subskribis kontrakton kun Agentejo Mundt. Fine la libro eldoniĝis, kaj ĝi prezentiĝis en la Universala Kongreso de Turino en 2023. Kaj iom poste en la liberecana ateneo de Gràcia.

Pri la traduko, unu el la plej interesaj aferoj estas kiel ĉiu tradukisto solvas la nomon de la hundo. En sia blogo, Carles rakontas la jenon: "Tial mi havis momenton de surprizo, kiam Jaume igis min rigardi la nomon elektitan de Itsván: Lazaro Ludoviko. Kia stranga nomo! Dank' al Ariadna, koleginino el la biblioteko, kaj esperantisto, mi malkovris la kialon. Kaj tio preskaŭ plorigis min de emocio. La nomo omaĝas al L. L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto. La du L rilatas al Ludwik Lejzer, Ludoviko Lazaro. Mirinde!" ■

BUTIKO*

butiko.esperanto.cat

**Serĉu kaj aĉetu vian libron, revuon aŭ diskon en nia retbutiko
Cerca i troba el teu llibre, revista o disc a la nostra botiga en línia**

JORDI CARBONELL I PINYOL (1933–2024)

Hektor Alos i Font

Socilingvisto



La 8an de novembro, Jordi Carbonell i Pinyol forlasis nin. Aktiva homo en multaj fakoj kaj senlaca laboremulo, ĉiam je la servo de la kataluna lingvo, li estis ankaŭ prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio inter 1987 kaj 1990 kaj kunaŭtoro de la Esenca esperanto-kataluna vortaro (1a eldono, 1997).

Li naskiĝis, kreskis, vivis kaj laboris dum sia tuta vivo en la kvartalo Sant Antoni en Barcelono. Lia patro, Magí Carbonell, estis irinta labori al Argentino. En 1928, reveninte en Barcelonon post dek jaroj, li fariĝis la posedanto de la trinkejo Chicago, en la vojkruĉo de Parallel kaj Ronda de Sant Pau. La 4an de februaro 1933 Jordi naskiĝis super tiu fama barcelona kafejo, konata renkontiĝejo de sindikatisoj dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj, laŭ la kronikoj. Tie

li pasigis longan tempon kiel infano kaj junulo, kaj tie li akiris apartan intereson por la diversaj varioj de la kataluna lingvo. Tiu inklino neniam forlasis lin.

Li studis farmacion kaj sukcesis malfermi apotekon malfor de la gepatrejo. Tie li laboris dum jardekoj, ĝis kiam lia filo Guillem transprenis la torĉon.

Jun-aĝe lia amo por muziko igis lin studi ankaŭ muzikon ĉe la Barcelona Konservatorio. Li estis unu el la lastaj disĉiploj de majstro Cristòfor Taltabull, kion li ĉiam sentis kiel honoron. Kunigante sian melomanecon kun sia ĝisosta katalunismo kaj amo al la kataluna lingvo, jam en 1965 li verkis serion de muzikrecenzoj en la nunmita katalunlingva revuo *Serra d'Or*. Tie ni povas trovi lian profundan ŝa-

ton por la muziko de la 20a jarcento, pri kiu li ofte emis paroli.

Li trapasis diversajn altnivelajn kursojn pri la kataluna lingvo. En 1973 aŭ 1974 li komencis instrui ĝin en la sidejo de la Kvartala Komitato de Poble Sec. En la komenco de la okdekaj jaroj li ekinstruis en la sidejo de la korporacio de apotekistoj. En tiuj jaroj li ankaŭ membris en la Leksikografia Kunordiga Komisiono pri Sciencoj, ligita al la Instituto de Katalunaj Studoj, kaj agis kiel unu el la redaktoroj de ĝia Leksikografia Folio.

La strebo, ke lia denaska lingvo estu nek pli nek malpli ol iu ajn alia, nature kondukis lin al esperanto ĉirkaŭ 1980. Kiel ĉiam, li zorge studis sian novan interesajon. Malgraŭ lia absoluta manko de deziro elstariĝi aŭ altiri atenton, lia preteco servi la aliajn

baldaŭ igis lin ano de la Konservantaro de la Internaciaj Floraj Ludoj. En siaj esperantlingvaj skribaĵoj, li ofte adoptis la pseŭdonimon “Karbero Kerno”, iaspecan tradukon de liaj familiaj nomoj. En la jaro de la Centjariĝo de esperanto, pro manko de kandidatoj, li akceptis la defion fariĝi prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio. En 1993 aperis la verko, pro kiu li estas plej memorata inter la esperantistoj: la Esenca esperanto-kataluna vortaro. Inter 2008 kaj 2013, same kiel li jam revis fininte

sian antaŭan taskon, li entreprenis la vastigon de la vortaro. Ĉi-foje li donis katalunajn ekvalentojn por ĉiuj kapvortoj kaj subkapvortoj de la Plena Ilustrita Vortaro. Kiel ĉiam, obstine laborema kaj ege zorgema, li pasigis ĉi tiujn jarojn, po kvar kvin horoj tage, antaŭ granda tablo plene kovrita de ĉiuspecaj vortaroj kaj enciklopedioj, verkante imponan preskaŭ milpaĝan tajpaĵon.

Li tamen ne sukcesis fini. En la lastaj jaroj de sia vivo, Jordi iom post iom

perdis sian memoron kaj la eksterordinaran mensan lertecon, kiun li ĉiam havis ĝis tiam.

Laŭlonge de lia vivo liaj intelektaj kapabloj, laboremego, alvokiĝo al servo kaj multflankaj interesoj pelis lin en tre malsamajn direktojn, kaj ĉie li rompis la principon de Peter. Ĉar li longe vivis, multaj el la homoj, kun kiuj li kunlaboris dum sia vivo, ne plu estas inter ni. Iuj el ni tamen konservas neforviŝeblan memoron de li. ■

JOAN BARCELÓ ANDREU

Xavier Margais Basi
Historiador

Ales darreries del segle XIX i fins bona part del XX es feren populars una sèrie d'agrupacions de ciutadans que tenien pràctiques i valors en comú. L'esperitisme en fou una i també d'altres com la maçoneria, la teosofia o el naturisme, que anaven conformant nous models de vida i, entremig, també, l'esperantisme.

Joan Barceló Andreu fou un destacat esperantista mallorquí, que aleshores també va interessar-se molt tant per la maçoneria com per la teosofia. De nissaga pagesa, esdevingué militar d'infanteria amb el càrrec de capità, arribà a entrar en combat a la guerra del Marroc durant el 1925, any en què se celebrà a Palma el XII Congrés de KEF i els XI Jocs Florals Internacionals. Just un any abans, durant l'anterior congrés de l'associació catalana d'esperantistes, ell havia demanat que els següents certàmens se celebrassin a Palma i malauradament tot i que ho va aconseguir no hi va poder assistir. Joan Barceló passà la torxa a l'enginyer Narcís Bofill, qui arrossegà la societat palmesana i dotà de centenars de pessetes els premis per als vencedors dels Jocs Florals.

En proclamar-se la II República espanyola i acollint-se a la Llei Azaña, Joan Barceló plegà de l'exèrcit i dedicà el temps a la curolla que el feia viure: l'esperantisme. Fundà el Grupo Lumo com a secció del Foment del Civisme i Amikeco, dins la Societat Instructiva Bellver, entitat pròxima al seu domicili. Feia de professor d'esperanto, seguint el mètode Cseh, com pertocava als qui tenien l'autorització acadèmica. També va col·laborar amb algunes entrades a l'Enciclopèdia d'Esperanto.

Amb el cap d'estat major, Fernando Redondo Ituarte, fundà l'entitat teosòfica Ramon Llull que, juntament amb la seva eventual relació amb la maçoneria, li causà un seguit de problemes amb les noves autoritats faccioses. El cop d'estat militar de l'estiu del 1936 el sorprengué de viatge a l'Índia. Efectivament, havia anat a Adyar, Madràs, a la seu de l'entitat teosòfica internacional. Obligat per les noves disposicions, es reincorporà a l'exèrcit just en tornar del viatge a l'Índia i fou destinat a Eivissa. Llavors s'encetà la persecució als qui havien estat a prop de la maçoneria i Joan Barceló fou re-



presaliat i així va perdre els beneficis inherents a la professió. Investigat per la policia a instàncies d'autoritats militars dels exèrcits de terra i marina, aquesta va informar que la seva activitat a Eivissa, fora de la professional, era l'ensenyament i divulgació de l'esperanto.

Morí a Felanitx, als 69 anys. Així, doncs, va tornar a la terra d'on havia sortit.

Que aquest article valgui com a homenatge a aquells esperantistes que, una generació més tardana a la dels pioners, batallaren tot intentant popularitzar l'esperanto i l'esperantisme. ■

KIAL I ĈAR

Pedro M. Martín Burutxaga

Lingvemulo



Una parella molt ben avinguda són *KIAL* (per què) i el seu company *ĈAR* (perquè). Gairebé sempre els trobem junts, el primer a la pregunta i el segon a la resposta:

Kial la manifestacio de doktoroj fiaskis?

Ĉar la afiŝon skribis unu el ili kaj poste neniu kapablis legi ĝin.

El significat de *fiaski* és clar, però compte amb un altre verb com *frakasí*, que podríem haver estat temptats de fer servir en aquest context i que no és allò que sembla, sinó que vol dir “trençar, destruir”.

- Kiel mortis via edzo?
- Venenita per arseniko.
- Sed, kial li havis la korpon plena je batoj?
- Ĉar li ne volis trinki ĝin, la fiulo!

Recordeu: *PER* (amb) indica l'instrument amb que es fa una acció. Altres preposicions semblants i fàcils de confondre entre elles són *POR* (per a), *PRI* (sobre, en relació a) i *PRO* (per)

Kial la unuan lingvon de infano oni nomas “patrinan lingvon”?

Ĉar hejme la patro preskaŭ neniam rajtas paroli.

RAJTI vol dir “poder” en el sentit de “tenir permís”. El substantiu és *RAJTO*, dret.

- Kial vi volas divorci?
- Ĉar mia edzo traktas min kiel hundon.
- Ĉu li batas vin?
- Ne, li volas, ke mi estu fidela.

Fixeu-vos en la frase “mia edzo traktas min kiel hundon”, com que és l'home qui considera així la dona, *hundo* porta acusatiu (min > hundon). Si fos la dona qui considerés l'home un gos, perquè la tracta malament, *hundo* no portaria acusatiu (mia edzo > hundo).

Juna bela knabino alvenas al lageto, senvestigas kaj iras al la akvo. Tiam aperas gardisto, kiu ĉion vidis, kaj diras:

- Estas malpermesite, ĉi tie bani sin.
- Kial vi ne diris tion al mi antaŭe!?
- Ĉar senvestiĝi ne estas malpermesite.
- Paĉjo, se oni ŝtelis nian *VISA*-karton antaŭ tri monatoj, kial vi ankoraŭ ne denunciis tion al la polico?
- Ĉar la ŝtelisto elspezas malpli da mono ol ni, mia filo.

En aquest últim tenim un exemple de comparatiu d'inferioritat: *MALPLI*

... *OL* ... (menys ... que ...) El de superioritat és, lògicament, *PLI* ... *OL* ... (més ... que ...)

Kial kelkaj homoj manĝas helikojn [*cargols*]?

Ĉar ili ne ŝatas rapidan manĝaĵon.

De vegades la parella es trenca i podem trobar altres maneres de respondre a la pregunta *KIAL*?

Kial araneoj mortigas la masklojn post koitado?

Por ke ili ne ronku.

D'altres vegades és *ĈAR* el que apareix sol, per donar una explicació.

- Paĉjo, mi ricevis malbonan noton en geografio, ĉar mi ne sciis, kie estas Afriko.
- Ĝi ne povas esti tre malproksime, ĉar en nia fabriko laboras nigrulo kaj li venas per biciklo.
- Panjo, el kie venas mia inteligenteco? El paĉjo aŭ el vi?
- Certe el via patro, ĉar la mian mi ankoraŭ havas.

La preposició *EL* indica el punt d'origen, la font, però si haguéssim fet servir *DE* també ens entendrien, sempre que tinguessin intacta la intelligència d'almenys un d'aquests progenitors, és clar, :-)

RAPORTO PRI KATALUNA KONGRESO

Alfons Tur

Prezidanto de KEA



Tiu ĉi estis la 40a kataluna kongreso de Esperanto, jes ja ronda cifero sed plej grave ĝi estis jubilea kongreso ĉar jam en 1924 Vic gastigis nian 11an katalunan kongreson. La estraro de KEA ricevis kaj tuj akceptis la proponon de la lokanoj por celebri kaj omaĝi la tiaman kongreson per alia kongreso, cent jarojn poste.

La kongreso okazis de la 17a ĝis la 20a de majo en Vic sed iamaniere ĝi startis en la antaŭa monato ĉar la 26an de aprilo en la Romia Templo en Vic inaŭguriĝis ekspozicio rememore al la 11a Kataluna Esperanto-Kongreso okazinta en la sama urbo antaŭ cent jaroj, ĝi estis omaĝo al la kongreso de 1924 kaj samtempe invito al la baldaŭ okazonta 40a kongreso.

La prezenton gvidis Miquel Bardagil, respondeculo de la ekspozicioj de la Romia Templo kaj partoprenis Carles Costa, ĝia aŭtoro kaj Alfons Tur, prezidanto de KEA.

La ĉeestantoj, lokanoj kaj eksteruloj, povis spekti diversajn specimenojn de originalaj materialoj de la kongreso okazinta antaŭ unu jarcento: poŝtkartojn, afiŝojn, librojn, revuojn, fotojn, ktp.

La ekspozicio estis vizitebla dum la kongreso mem kaj eĉ post ĝi, ĝis la 26an de majo.

La kongresa temo estis Popolaj Ate-neoj kaj kultura kaj scienca disvasti-go ĉar tiuj institucioj celis atingi, per edukado kaj kultura trejnado, socion pli justan, pli egalan kaj, ĉefe, liberan kaj tial la esperanto-movado kreskis en la popolaj ateneoj kaj ili fariĝis rifuĝejo de subteraj organizaĵoj dum la hispanaj diktaturoj.

La anaro ne estis tiom internacia kiel en aliaj okazoj, tamen partoprenis centoj da homoj, ĉefe el Katalunio mem, sed ankaŭ el Eŭskio, Hispanio, Okcitanio kaj Francio. Bedaŭrinde pro manko de la hispana vizo ne

povis veni kelkaj homoj el Azio kaj Afriko kiuj anoncis sin.

La nunjara kongreso celis ligi kaj omaĝi tiun de unu jarcento pli frue, tial la solena inaŭguro okazis en la Kolona Salono de la Urbodomo, kiel antaŭ cent jaroj, solene sed en malpli patosa stilo. La ceteraj aranĝoj okazis ĉefe en la kultura centro Joan Triadú, situanta en la urbocentro kaj kiu montriĝis tute konvena.

La programo estis klasika kaj diversa, kun eroj en esperanto kaj en la kataluna: prelegoj kaj debatoj pri la kongresaj kaj pri aliaj temoj, sciencaj prezentoj, kursoj pri esperanto kaj pri la kataluna, kulturaj vizitoj, filmoj en esperanto, vikipedio kaj eĉ gufujo kaj magio!

Ekster la kongresejo okazis diversaj kulturaj vizitoj interalie al episkopa muzeo kaj al domo Pratdesaba kaj sia astronomia observejo. Dumnokte surstrataj koncertoj de JoMo kaj Kaj Tiel Plu malfermitaj al kongresanoj kaj lokanoj kiuj povis ĝui ilin.

Alia elemento kiu ligis intan kaj nunan kongreson estis la kongresa Telegram kanalo kiu estis nomita Kometo laŭ la nomo de la kongresa surpapera informilo de 1924.

La omaĝo al la antikva kongreso atingis la lastan eron de la nuna ĉar ĝi finiĝis per komuna bankedo kaj posttagmanĝa kantimprovizado en la restoracio Casino: la sama de antaŭ cent jaroj kaj kun simila menuo al la tiam. ■

RAPORTOJ PRI 109A UK EN TANZANIO

Sandra Vives

Peranto, estrarano de KEA



JOHN HUANG PHOTOGRAPHY

Antaŭ ol estis anoncote, ke la afrika kontinento gastigos la UK, tiu evento ne sufiĉe vekis mian intereson por partopreni. Mi devis atente plani mian buĝeton, ĉar mi ne volis vojaĝi tien sen havi la eblon ankaŭ ĝui la vidindaĵojn de la lando kaj resti kelkajn tagojn pliajn. Mi profitis de la rabato anoncita en marto de Ethiopian Airlines por la kongresanoj. Por ŝpari eĉ pli, mi loĝis en gastejo proponita por homoj junanimaj. Tio estis mia unua fojo ekster Eŭropo, kaj mi vojaĝis sola de Barcelono al Aruŝo, kun haltoj en Ĝenevo kaj Adis-Abebo. Estis bone scii, ke mi kaj Ĵordi Calafi estis la nuraj katalunoj tie. La 30an de julio, ni renkontiĝis por forveturi al antaŭkongresaj ekskursoj, kaj mi pasigis la sekvajn kvar tagojn ĉefe en ĵipo, akompanata de loka gvidisto kaj aliaj ses esperantistoj (inkluzive tradukiston). Dum

tiuj tagoj, mi vizitis la lagojn Manyara kaj Eyasi, la Nacian Parkon Tarangire, la tribojn Hadzoj kaj Datogoj kaj la krateron Ngorongoro. Sendube, ĝi estas la plej impona loko, kiun mi iam ajn vizitis, pro sia grandiozeco, alteco kaj karaktero kiel ekvilibra ekosistemo inter predantaj kaj nepredantaj bestoj. Mi povis vidi elefantojn, zebrojn, gnuojn, antilopojn, gazelojn, bubalojn, ĝirafojn, hipopotamojn, plurajn speciojn de simioj, kelketajn leonojn, multajn birdojn kaj aliajn bestojn. La 109a UK okazis inter la 3a kaj la 10a de aŭgusto. Partoprenis 596 kongresanoj el 59 landoj, plejparte el Tanzanio kaj aliaj afrikaj landoj (sendube kun subteno de UEA). La meza aĝo de la kongresanoj estis 46, koincide mia propra aĝo! La kongreso okazis en registara konstruaĵo kun pluraj kunvenejoj, kaj sur la supra teraso oni povis eksterordi-

nare ĝui la provizon de bongustaj manĝaĵoj (eĉ veganaj!) kaj distrajn noktajn programerojn. Mi miris pri la amplekso de prelegoj okazantaj samtempe en diversaj lokoj; kelkaj ŝajnis nekompreneblaj aŭ ne alireblaj por ĉiuj, kiel la IKU, AIS, la Kleriga lundo aŭ la Scienca universitato. Tamen, mi ĉeestis plurajn interesajn programerojn, el kiuj mi aparte subtrekus la sesion pri Virina Agado, ĉar tiu komisiono de UEA estis reaktivita post longa periodo de neaktiveco. Mi ankaŭ partoprenis du tuttagajn ekskursojn: lundon al kafplantejo kaj akvofalo Kikuletwa kaj de tie al termofonto, kie mi ĝuis varman naturan banon; merkredon mi marŝis dum preskaŭ ok horojn en la parko Kilimanjaro, kune kun la aliĝintoj kiuj ne rezignis mezvoje kaj devigaj profesiaj gvidistoj. La solenaĵoj ĉe la malfermo kaj fermo de la kongreso estis

impresaj, kun la kunkanto de La Espero, kaj diversaj prezentoj de nacia muziko, dancoj kaj masaiaj tradicioj. Mi esperis, ke estus pli da miksiĝo inter afrikaj kaj neafrikaj partoprenantoj, sed ŝajnis al mi ke ili ne volis ĝeni la nekonatojn. Pro la malpli alta aĉetpovo, afrikaj esperantistoj ne estis viditaj en trinkejoj aŭ restoracioj; ekster la kongresejo ili partoprenis nur kiel gvidistoj aŭ tradukistoj, kaj mi kortuŝe memoras Sarah Bambona, kiu helpis min dum marĉandado en la Masaia merkato. La artaĵoj, kiujn mi vidis en la Centro de afrika kultura heredaĵo restos porĉiame en mia memoro; pentraĵoj, skulptaĵoj, maskoj kaj mebloj tiom interesaj kaj mal-similaj al tiujn troveblaj en la eŭropaj muzeoj! Mi devas esprimi mian dankon al la Kongresa Fakto de UEA, ĉar sukcesigi tiun aranĝon sendube postulis grandegan strebadon. ■



Jordi Calafi

Universitata studento

Des de fa una vintena d'anys, el moviment esperantista ha anat creixent arreu del continent africà, tot i la manca d'esdeveniments internacionals que s'hi organitzen. L'Àfrica Occidental compta des de fa ja anys amb una forta comunitat esperantista autoorganitzada, que va aconseguir celebrar la IJK el 2017 a Aneho, Togo. Aquest congrés va marcar un toc d'atenció a les organitzacions esperantistes internacionals, que han celebrat congressos a tots els continents menys a l'Àfrica. Tot i així, poca gent sap que el que podria considerar-se el primer esdeveniment internacional esperantista va ser el Congrés de ILEI el 2008 a Porto-Novo, Togo. Des que va començar el millenni, han aflorat moltíssimes iniciatives per promoure l'ús i l'aprenentatge de l'esperanto al continent. El primer Congrés Afri-

cà d'Esperanto va tenir lloc a Notse (Togo) el 1990, i se n'han anat celebrant irregularment a països de l'Àfrica Central fins a arribar al 8è Congrés Africà d'Esperanto a Thiès, Senegal. Aquest any era el torn d'Arusha, de Tanzània, de l'Àfrica de l'Est. En les últimes dècades, el nombre d'esperantistes s'ha anat multiplicant any rere any i tocava estar-hi a l'altura. El 109è Congrés Mundial d'Esperanto ha estat una oportunitat d'or per culminar aquest creixement i acostar un esdeveniment que s'ha trobat sempre -injustament- allunyat d'Àfrica.

Demogràficament, els joves són majoria al continent, fet que es veu reflectit en la seva comunitat esperantista. La major part dels participants africans del Congrés Universal d'Esperanto tenien una mitjana d'edat de 30 anys, és a dir uns 200 joves en total. La majoria dels amics esperantistes que vam fer al Congrés han vist en l'Esperanto una eina útil per accedir a una comunitat internacional d'amistats, contactes i vivències, on tothom és tractat amb igualtat. En un món despietat en què tothom va per

feina, veure com tanta gent creu més que mai en els valors fundacionals de fraternitat i internacionalitat, ens va aportar un bri d'esperança en la humanitat. Molts amics que vaig fer al Congrés venien de contextos molt diferents als nostres. Per a mi, va ser una oportunitat única per conèixer gent de països que em resultaven molt remots. La majoria d'amics venien de la República Democràtica del Congo, però també vaig conèixer al llarg de la setmana amb gent de Tanzània (els amfitrions), Benín, Burundi, Kenya, Senegal, Angola, Madagascar, Togo, Gàmbia... La representativitat era elevada. Molts cops, ens fèiem creus amb altres europeus de com havien arribat a aprendre l'Esperanto col·legues de països com la República Centreafricana o Eritrea, per no parlar del Congo mateix, tenint en compte les tensions actuals que ens arriben per les notícies. D'alguna forma o altra, l'Esperanto també suposa en aquestes situacions una manera de connectar d'igual a igual amb la resta d'éssers humans i ens ensenya que, malgrat tot, cal tirar sempre endavant. ■

LASTA AGADO DE KEJ

KEJ, OFICIALA ASOCIO EN LA UPF

Jaime Tapia Zaragoza

Unu el la ĉefaj celoj de la estraro de KEJ ĉi-mandate estis iĝi oficiala asocio de la Universitat Pompeu Fabra en Barcelono, ĉar kelkaj el la membroj de la junularo estas studentoj tie. La decido estis motivita de la fakto ke iĝi oficiala asocio tie kunportintus multajn avantaĝojn al la junularo, kiel subvencioj, disponeblo de lokoj, facileco por fari kursojn kaj aktivajojn tie, ktp. Post sufiĉe da burokratio kaj interŝanĝo de mesaĝoj kun la universitato fare de la estrarano pri eksteraj rilatoj (mi mem), ni sukcesis nian celon, kaj junie ni iĝis la kvindeka asocio de la universitato.

Septembre ni partoprenis La Benvinguda, aktivajon por bonveni la internaciajn kaj la novajn studentojn de la universitato. Lucía kaj Isaac povis konversacii kun multaj junuloj kaj diskonigi nian junularon kaj nian movadon. La venonta agado planita de la estraro en la UPF estas enkondukkurso instruata de Jordi Calafi. Ni jam okazigis kurson en la UPF antaŭ du jaroj kaj ĝi estis sufiĉe sukcesa. Ni esperas trovi denove ĉi-jare multajn KEJ-anontojn interesatajn pri nia lingvo kaj nia movado! ■

CURS D'ESTIU D'ESPERANTO A SANT JOAN DE MEDIONA

Jordi Calafi



El passat mes de juliol, Sant Joan de Mediona va acollir el Curs d'Estiu d'Esperanto, que va aplegar una vintena de participants del Penedès i l'Anoia, amb persones de totes les edats i perfils. L'esdeveniment es va dur a terme a les instal·lacions del despatx de disseny Bildi - Kunlabi, gràcies a la col·laboració de Martí Ferré. Kunlabi, més enllà de ser un espai dedicat al disseny, es dedica a dinamitzar el territori a través d'activitats com aquest curs. A més de ser una oportunitat única per aprendre Esperanto, ha estat una llavor per revitalitzar el mo-

viment esperantista al Penedès, en un moment especialment significatiu coincidint amb la recent inauguració de l'Espai Esperanto a Subirats. Les sessions van alternar classes virtuals amb presencials, sempre amb un ambient distès i informal. Els participants van poder fer una capbussada en la llengua internacional i adquirir de forma ràpida els coneixements més bàsics per a fer-se entendre. D'aquesta manera, es va poder reforçar l'aposta de la comarca per l'ús de l'Esperanto com a eina de comunicació internacional i solidaritat local. ■

RAPORTO PRI IJK EN LITOVIO

Irene Albert Cruz



LA ONDO DE ESPERANTO

Lastan semajnon de aŭgusto (de la 18a ĝis la 25a) okazis en Litovio la 80a IJK de TEJO. Ĝi okazis en Ŝventoji, marborda urbeto norde de Palanga. Estis facile atingi la kongresejon: “Energetikas”, kabana tendumejo inter marbordo de Balta Maro kaj rivero Ŝventoji. La loko estis perfekta, ĉar oni povis laŭplaĉe iri al la urbo aŭ al la plaĝo -kondiĉe ke oni ne estu homo sensiva al malvarma akvo!

La kongreso daŭris unu semajnon. Mi havis ŝancon partopreni “Erasmus+”-projekton, subvenciitan de Eŭropa Konsilio. La projekto temis pri manĝkutimoj, manĝpolitikoj kaj kiel manĝaĵoj estas ligitaj al kulturo. La grupo konsistis el junuloj de tre malsamaj naciecoj. Mi tre ŝatis lerni pri la kutimoj de ĉiuj landoj; surprizigis min, ke ni estas tre similaj pri kelkaj aferoj sed tre malsamaj pri multaj aliaj. Krom diskuti kaj paroli pri manĝaĵoj kaj kutimoj en malsamaj lokoj de la mondo, ni kuiris por kunkoni kaj kunmanĝi tipajn

manĝaĵojn de ĉiuj landoj dum la trinkomanĝa nokto.

Krom la projekton, eblis partopreni ekskursojn. Mi aliĝis al du: promenado tra marĉo kaj promenado kaj kajakado. En la unua, ni marŝis laŭ vojo enkaŝita sub marĉa koto. Tiu sekreta vojo tre gravegis por la litovaj triboj dum la 13a kaj 14a jarcentoj. Tra tiu vojo, la triboj povis fuĝi de la kruckavaliroj kaj garantiis sian supervivadon. En la dua, ni promenis proksimume 9km-n, unue tra urbanizitaj areoj kaj poste tra arbaro, por atingi la kajakejon. De tie ni kajakis 10km-n laŭ la rivero Ŝventoji ĝis ni denove atingis la kongresejon. Dum ambaŭ ekskursoj mi multe lernis pri la miriga historio de Litovio. Litovaj gvidistoj akompanis nin; ili rakontis al ni multajn kuriozajn kaj rimarkindajn okazintaĵojn de sia lando.

Mi povis ankaŭ admiri la naturan riĉecon de la lokoj. Ĉi kongreso estis

mia unua IJK. Mi ne havis fluan esperantan nivelon kaj mi konis neniun partoprenanton. Pro tio mi havis dubojn antaŭ la vojaĝo... Ĉu mi vere kuraĝos iri? Tamen mi komprenis ke ĉi tiu defio estos okazo por uzi la esperantan lingvon, praktiki ĝin kaj do plibonigi mian lingvonivelon. Plie, mi konstatis ke ĉiuj provas helpi kaj kompreni vin ĝis vi povas komuniki.

Kiam tiom da uloj el diversaj lokoj kunigas, vi povas lerni kaj riĉiĝi multe pro la diverseco; vi povas ankaŭ renkonti kaj fari mirindajn amikojn el la tuta mondo. Organizite tiom da agadoj kaj gastigi tiom da homoj ne ŝajnas facila afero. La programo proponis al ni multajn alternativojn kaj la etoso en la kongreso estis bonveniga kaj komforta. Koran dankon al ĉiuj organizantoj, kiuj faris ke la kongreso okazis kaj al ĉiuj esperantistoj kiuj helpis min lasi tiujn dekomencajn dubojn kaj timojn; ili donacis al mi la deziron daŭrigi en esperantujo kaj partopreni en multaj pliaj kongresoj!!! ■

AGADO DE KEA EN 2024

Alfons Tur

Prezidanto de KEA



Verki raporton pri asocia agado estas ŝajne facila afero kiun oni povos plenumi rapide. Tamen, post revizado de bultenoj, pridemandoj al organizintoj kaj konsulto al la propra memoro (certe malfidinda, sed ve, ne eblas aĉeti alian!) oni tuj rimarkas ke multo estis farita en la lastaj monatoj. Tio estas unuflanke kialo por fiero kaj ĝojo kaj, eĉ pli grave, instigo al daŭrigo kaj plibonigo.

En la lasta numero de nia revuo ni raportis pri la agado ĝis la monato de marto, do tial vi povos nun eksciigi aŭ rememori pri la okazintaĵoj ekde aprilo ĉijare.

Aprilo estis monato bunta je agado. Komence de la monato Carles Vela faris novan prezenton de nia eldono Home en ruĝes ĉe Espai Cultural Can Marquès en Camprodon (Ripollès). Klasikaĵo en tiu monato estas la budo(j) okaze de la librotago; ordinare KEA starigas du budojn, en Barcelono kaj Sabadell. Ĉijare ni tamen havis eĉ kvar budojn! Al la tradiciaj lokoj aldoniĝis Canyelles (Garraf) kaj Vic (Osona).

Du tagoj pli frue, la 21an en Canyelles ni havis budon en la loka foiro kaj krome okazis prezentado de la libro Home en ruĝes, fare de Alfons Tur

ĉe Espai Romanguer kun prezento de la urbestro Rosa Huguet. En la “oficiala tago” de Sankta Georgo la budoj en Barcelono, Sabadell kaj Vic estis ege sukcesaj. La elekto de Vic ne estis hazarda; ĝi estis la kongresa urbo. Tial dum aprilo okazis diversaj agadoj, kiel antaŭpreparo de la kongreso, krom la menciita budo, lingvokurso gvidita de Siru Laine kaj ekspozicio en la romia templo pri la kongreso okazinta samurbe antaŭ cent jaroj.

De la 17a ĝis la 20a de majo okazis en Vic la 40a KKE (pri ĝi vi povos legi apartan artikolon). En la sama monato KEA partoprenis en Fira literala

La 14an de oktobro okazis flora ofero antaŭ la monumento dediĉita al la memoro de Francesc Ferrer i Guàrdia, situanta en la Avinguda de l'Estadi en Barcelono



kun budo kaj prezento de la libro Home en ruĝes fare de Carles Vela.

Junio estis malpli aktiva monato; tamen la 8an okazis nova prezento de la libro, ĉifoje en la sidejo de Gent de Masnou (Maresme).

En julio estis denove grava aktivado, ĉar la 6an ni havis la inaŭguron de la nova Centro pri Dokumentado de Esperanto en Sant Pau d'Ordal, municipo de Subirats (Alt Penedès). Preskaŭ cento da homoj ĉeestis la aranĝon, organizita de la Urbestro de Subirats kaj KEA ĉe la Urbodomo de Subirats, kie situas la nova ekspoziciejo kiu montras part(et)on de la havaĵo.

La aranĝo komenciĝis per la unufoja Esperanta-itinero laŭ la stratoj de Sant Pau d'Ordal sub la gvido de Alfons Tur. Kiam la vizito finiĝis, la solenaĵo komenciĝis per parolado de

la loka Skabeno pri Kulturo, Fèlix Mallofré, kiu bonvenigis la ĉeestantojn kaj faris enkondukon al la socia valoro de Esperanto pere de la legado de teksto de la elstara maldekstrula kataluna politikisto kaj movadano Andreu Nin. Tuj poste la firmao, kiu dezajnis la ekspozicion, klarigis la kriteriojn de selektado kaj konstruado de la ejo, rimarkante ĝian specifajn.

Siavice la prezidanto de la Kataluna Esperanto-Asocio prelegis pri la graveco de Sant Pau d'Ordal kaj Subirats en la historio de esperantismo en Katalunio. Li ankaŭ parolis pri Esperanto kiel lingvo de movado kaj idearo, kiuj nuntempe daŭre vivas, en Katalunio kaj tutmonde.

Poste Carme Hernández, nepino de la fondinto de la iama Muzeo de Esperanto, Lluís Hernández Yzal, rakontis la vivhistorion de sia avo kaj parolis pri la graveco de kolektado

kaj Esperanto en la vivo de li kaj de lia edzino, Teresa Massana. Ŝia parolado ankaŭ depostulis la rolon de la inoj ene de familio kaj de la esperantista movado entute, kutime preskaŭ forgesita.

Finfine, la Urbestro de Subirats, Lia Moŝto S-ro Jaume Domènech, finis la oficialan parton de la evento kaj deklaris oficiale inaŭguritan la Esperanto-Spacon de Subirats. Tujsekve Enric Pineda recitis la poemon "Acollida" (pr. akuljida), katalunlingvan tradukon fare de Ferriol Macip de la poezio "Akcepto" de Frederic Pujulà, kiu estis la himno de la 5a Internacia Kongreso de Esperanto en Barcelono (1909). Poste Xavier Rodon kaj Mar Navarro muzike interpretis la saman pecon Esperante. La evento finiĝis per vizito de la ĉeestantoj al la Spaco Esperanto.

La sekvantan tagon, la 7an, okazis nova prezento de Home en ruĝes,



en tiu kazo kadre de Aplec de cultura nacional en Prats de Molló (Vallespir, Norda Katalunio).

Someraj prezentoj de nia lasta eldono ne finiĝis en julio, ĉar la 19an de aŭgusto kadre de la Universitat Catalana d'Estiu en Prada de Conflent okazis alia prezento.

Kvankam ne temas pri oficiala agado de KEA, ni volus substreki la partoprenon de KEA/KEJ-anoj en la unua Universala Kongreso en Afriko, okazinta en Aruŝo, Tanzanio.

Post la somera paŭzo, septembra agado ekis la 11an kiam, invititaj de la municipo de Sabadell, KEA partoprenis la floran omaĝon okaze de la kataluna nacia tago; samtage ni starigis budon en la foiro organizita de Òmnium Cultural ĉe la Triomfarko en Barcelono. Fine de la monato nia estrarano Ludoviko de Gispert re-

prezentis KEA-n ĉe la konferenco Celtic Knot Wikimedia Languages en Waterford, Irlando. Tiu ĉi internacia evento kunigas homojn, kiuj volas subteni kaj protekti minoritatajn aŭ minorigitajn lingvojn per projektoj de Vikimedio, kiel Vikipedio, Viki-fontaro aŭ Vikidatumoj.

La 14an de oktobro okazis flora ofero antaŭ la monumento dediĉita al la memoro de Francesc Ferrer i Guàrdia, situanta en la Avinguda de l'Estadi en Barcelono. La evento, organizita de la Fondaĵo Ferrer i Guàrdia, celas omaĝi la figuron de tiu siatempe elstara pedagogo, liberpensulo kaj esperantisto ekzekutita antaŭ 115 jaroj post juĝo fare de milita tribunalo kaj maljusta kondamno pro lia supozita implikiĝo en la Tragika Semajno de 1909.

Oktobro estas ankaŭ monato kiam startas la ĉeestaj kursoj. Ni ĝojas ra-

porti ke ili denove komencis en Biblioteko Jaume Fuster en Gràcia (Barcelono) kaj ke ĉiuj la oferitaj lokoj pleniĝis, estas eĉ atendolisto! Okazis ŝanĝo ĉar Xosé Conde, kiu en la lastaj jaroj bonege gvidis la kurson (koran dankon al li), devis rezigni pro profesiaj kialoj. Pro tio la respondoncon transprenis Pedro Martín Burutxaga, bone konata de ni ĉiuj.

Laste, sed ne balaste, mi volus rimarkigi la geografian distribuon de nia agado. Krom Barcelono kaj Sabadell, kiuj estas neeviteblaj kaj centraj, ni agis ankaŭ en la komarkoj Maresme, Osona, Alt Penedès, Garraf, Ripollès, Vallespir kaj Conflent. Mi volus aparte emfazi la du lastajn, ĉar de multaj jaroj ni ne ĉeestis en Norda Katalunio. Mi volus aparte danki al Carles Vela, Mon Cardona kaj Ludoviko de Gispert, kies sindonemo kaj sindediĉo ebligis multajn el la menciitaj eventoj. ■

Fariĝu membro de IKEL



Valorigu la liberecon kaj la diversecon,
aliĝu al la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj
kaj ricevu **Etnismon** senpage



ESPERANTAJ PODKASTOJ

Viktoro Solé
Muzikinstruisto



La tutmonda disvastiĝo de interreto ebligis novajn manierojn aŭskulti radiostaciojn, ĉar, kiel ĉiu homo pli ol dudekjaraĝa bone scias, ĝis la apero de tiu nova medio, oni devis akurate aŭskulti la preferatan radian programon ekzakte en la tempopunkto kiam ĝi estis onde elsendata kaj en la monda parto kie tiuj ondoj riceveblis. Nuntempe, krom aŭskulti iun ajn programon tiel, oni kapablas aŭskulti ĝin el la retpaĝo de la koncerna radiostacio. Tamen, interreto ankaŭ faciligis, ke homoj kiuj ne apartenis al iu ajn radiostacio elsendis siajn memfaritajn programajn epizodojn. Tiu relative nova komunika realaĵo nomiĝas *podkasto*. Krome, pere de poŝtelefona apo oni rajtas aboni specifan podkaston kaj ties novaj epizodoj elŝutiĝas aŭtomate.

Tiu nova maniero aŭskulti aŭddosierojn tre bone adaptiĝis al la trajtoj de nia Vilaĝo Esperanto, ĉar ni ne loĝas en la sama mondareo, nek en la sama horzono. Tial, la kutimaj radiaj programoj ne taŭgas por ni. Male, se oni kapablas ludigi tiujn arkivojn ie kaj iam ajn, tio estas alia afero. Aldone, kiam oni pensas pri senspeza laboro, plene volontula, por disvastigi idealan aferon kiu solvas problemon pri kiu la homaro ne bone konscias, jen

ni, homoj kiuj semas kaj semas kons-tante. Kaj tio signifas, ke malgraŭ ke podkasto nuntempe estas preskaŭ nova monda pandemio, la kvanto de esperantaj podkasto eble estas proporcie pli alta ol en aliaj neverdaj medioj.

La pionira esperanta podkasto aperis en Vankuvero (Kanado) en 1998 kaj nomiĝis *Radio Verda*. Arono kaj Karolina tre afable prezentis novaĵojn kaj diversajn interesajn aferojn dum 247 epizodoj. Tiu ĉi unua podkasto bedaŭrinde ĉesis en 2013.

Ankaŭ en 1998 aperis *Esperanta Retradio* fondita de Anton Oberndorfer. Ekde 2011 artikolo (skribita kaj voĉe registrita) aperas ĉiutage el multnombra grupo da kunlaborantoj. Tre interese ĉefe por komencintoj kaj progresantoj ĉar la lingvaĵo estas vere modela kaj oni povas nur legi aŭ nur aŭskulti ĉiujn artikolojn, aŭ samtempe fari ambaŭ aferojn.

Rimarkindas la podkasto *Pola Retradio en Esperanto*, kiu estas la daŭrigo de la multjara Pola Radio, la nacia radiostacio de Pollando kiu elsendis ĉiutagan esperantan programon ĝis 2011. Ekde tiu ĉesigo Barbara Pietrzak, la ĉefa redaktorino, kun la

helpo de malgranda skipo, daŭrigas la elsendojn volontule.

Menciindas ankaŭ la podkasto de nia samasocio Chus García Cano, *Ne parolu pri Esperanto*, kie, ekde 2021 kun la partopreno de interesaj homoj, fakuloj pri diversaj temoj, oni ĉefe parolas pri scienco, kaj ne pri Esperanto, kiel ties titolo taŭge aver-tas nin.

Oni ne forgesu pri la novaj beletr-emaj podkasto, kiel *Bobelarto* de Stela Besenyei-Merger (2022), kun gastoj kiuj legas rakontojn, kaj *Rakonta tempo* (2023) kie oni povas aŭskulti unu legitan novelon (origi-nalan aŭ tradukitan) en ĉiu epizodo.

Kaj mi finu per miaj nuntempe plej preferataj: kompreneble temas pri *Varsovia Vento* (bla, bla, bla), fondita de Irek Bobrzak en 2006, kiu estas tre profesia monata podkasto sufiĉe longa kun esperantaj novaĵoj, intervjuoj, muziko, ktp. Laste, ekde 2022 aperis tre interesa podkasto kies nomo estas *Usone, persone*. Temas pri tre talenta triopa skipo formata de Hans Becklin, Rafa Nogueras kaj Brandon Sowers, kaj ili parolas (en tre altnive-la Esperanto) pri literaturo, politiko, lingvoj, ktp. Tre rekomendinda. ■

Home en ruïnes

Relats i poemes des dels camps de la vergonya

Per la seva activitat professional i política, Jaume Grau Casas (Barcelona, 1896 – València, 1950) va haver d'exiliar-se a França després de la Guerra d'Espanya. Allà, les autoritats

franceses el van tenir tancat en diferents camps de concentració fins gairebé el final de la Segona Guerra Mundial (Argelers, Bram, Montoliu, el Recebedor, Neïçon, Tombaboc). Va sobreviure a la duresa dels camps (fam, fred, epidèmies etc.) gràcies a l'escriptura. En les condicions més adverses, mai va deixar d'escriure, en català, esperanto, castellà i francès. En sortir dels camps tenia escrits més d'una dotzena de llibres, testimonis directes i coetanis de la duresa d'aquests camps de la vergonya on tants exiliats republicans, i no només, van perdre la vida. Les dificultats de la postguerra, tant a Tolosa de Llenguadoc com després a València, i la mort sobtada abans dels 54 anys li va impedir dur-los a impremta. Després d'una primera edició en francès i una altra en esperanto, ara l'Associació Catalana d'Esperanto ofereix en català un recull d'aquests relats i poemes.



GRAU CASAS, Joan. Home en ruïnes. *Relats i poemes dels camps de la vergonya*.
Associació Catalana d'Esperanto 2023. 592 pàgines. 28 euros. ISBN 978-84-125434-4-5

<https://butiko.esperanto.cat>